

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



Eŭrop-Unia Kongreso

Vieno ne mutiĝu

**Michael Jackson:
apenaŭ Esperanto**

Ferenc Szilágyi Centjara

Enhavo

- 121** Kulturo: Biblioteko pli kaj pli riĉa (Ulrich Lins)
- 122** Centjara datreveno de Ferenc Szilágyi (1895-1967):
La hungara/sveda fenomeno en nia prozo (Poul Thorsen);
Memori pri Ferri (Mogens Groth)
- 125** Afriko: Kilimanĝaro kronos Kvaran Afrikan Kongreson
- 126** Eŭropa agado: Pentekoste en Parizo (S. Davies, J. Rapley,
D. Thomson); Lingvopolitiko por multkultura Eŭropo:
Deklaro pri lingva kaj kultura diverseco en la Eŭropa Unio
- 127** Lingvopolitiko: Tria lingvo por tutmondiĝo (Choe Taesok);
Alternativoj por la lingvoservoj de UN (H. Tonkin, R. Brisebois)
- 128** Eŭropo: Vibroj kaj libroj en Kroatio
Esperanto en radio: Vienon oni mutigas (AERA);
Loke, fake; Esperantaj radio-elsendoj per satelito;
Por ke aŭdiĝu la voĉo de Sarajevo (Mustafa Resulović)
- 130** Muziko: Nur piednoto en Jackson-Historio
Kalendario 1995-1996
- 132** Recenzoj: *Familio Talhe. Sedrvaĝardeno* (W. Usakiewicz);
Tradukarto (W. F. Pilger); *Deklingva manlibro pri politiko*
(A. Pettyn); *Buŝo plena je tero* (N. Gudskov); *Blankaj aŭroroj*,
Blankaj mamoj de Bosilka, *Eterna domo*, *Kastelo de la rozo*,
Nevidebla rivero, *Nokto de parolo*, *Raviĝoj*, *Tagmeza sonĝo*
(H. Alos i Font); Kargon al ĉies haveno (P. Rulofido); *Aktoj de*
Internacia Scienca Akademio Comenius, Vol. 1 (R. Corsetti)
- 135** Laste aperis; Foliume
- 136** Reagoj
- 137** Loke – Fake – Persone
- 139** Oficiala informilo
- 140** Nekrologoj: Jean Thierry (1924-1995)

Vi trovos

en neniuj artikoloj la ciferon 443, ĉar ni ne kutimas statistiki pri la membraro en jarmezono; ni notu tamen ĉi tie ke UEA nombras nun, fine de junio, 443 membrojn pli ol je la sama dato en 1994. Temas pri ĝojiga evoluo, el kiu ni tamen ne tiru troigajn konkludojn.

Ne troigi: tio ŝajnas ĝusta sinteno ankaŭ rilate al la temo "Michael Jackson kaj Esperanto". Kiel vi legos (p. 130), la rolo de Esperanto ĉirkaŭ lia nova disko montriĝis fine neglektinda, maksimume inda je piednoto en niaj analoj.

Statistikojn ankaŭ pri Biblioteko Hodler (p. 121) ni bedaŭrinde ne donas: ni ja vidas en la Centra Oficejo kiel ĝia libraro (gazetaro, kasedaro...) kreskas po centoj ĉiujare, sed laborforto mankas por ĝiaj detala prilaboro kaj fake kontentiga registrado. Eble ĝuste vin nia biblioteko bezonas por ke tiu malinda stato ekmalaperu.

La kovrilo: Sur foto de Edith Jensen, Ferenc Szilágyi lunĉas subĉiele kun sia edzino dum la 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto (1966). La "hungara/sveda fenomeno" (tiel nomata de Poul Thorsen, p. 122) naskiĝis antaŭ cent jaroj.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA,
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 436 10 44; 436 15 39.

Telefakso: (010) 436 17 51.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto
n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta
ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estrararo de UEA

Prezidanto (kunordigado, reprezen-
tado): prof. d-ro John C. Wells, 5
Poplar Road, London, Britio SW19
3JR; tel. +44/(0)181/542-03-02; fakso
715-40-10.

Vicprezidanto (landa kaj regiona
agado): d-ro Ulrich Lins, Gemarken-
str. 150, DE-51069 Köln, Germanio;
tel. +49/(0)221/680-32-50.

Ĝenerala Sekretario (informado,
eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark T.
Fettes, 158 A Henderson Avenue,
Ottawa, Ontario, Kanado K1N 7P6; tel.
+1/613/565-92-82; fakso 565-92-79.

Estrarano (financo): s-ro Hans
Bakker, Kastelenstr. 231-II, NL-1082
EG Amsterdam, Nederlando; tel. +31/
(0)20/642-18-53.

Estrarano (azia agado): prof. d-ro
So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11,
Seoul — 158-600, Korea Respubliko;
tel. kaj fakso +82/(0)2/646-54-13.

Estrarano (kulturo, kongresoj): s-ino
Michela Lipari, Viale Giulio Cesare
223, IT-00192 Roma, Italio; tel. +39/
(0)6/39-72-61-98; fakso 39-72-61-69.

Observanto (Internacia Ligo de Espe-
rantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ino Marija
Beloŝević, Sveti duh 130, Ĉrnomorec,
HR-41000 Zagreb, Kroatio; tel. +385/
(0)1/576-092; fakso 433-407.

Observanto (Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo [TEJO]): s-ro
Danny ten Haaf, Clarensteeg 2 G,
NL-2312 WJ Leiden, Nederlando; tel.
kaj fakso +31/(0)71/148-801.

Biblioteko pli kaj pli riĉa

De tempo al tempo — laste en decembro 1991 — nia revuo informas pri Biblioteko Hodler (BH), la biblioteko de UEA en Roterdamo, kiu estas unu el la plej grandaj kolektoj de Esperanto-libroj kaj periodaĵoj en la mondo (pli ol 15 000 libroj kaj broŝuroj).

La bibliotekoj en Vieno (Internacia E-Muzeo) kaj Londono (E-Asocio de Britio) kelkrilate rivalas kun BH, sed unika ĝi estas i.a. pro sia regula, kvazaŭ natura kresko, ĉar eble neniu alia biblioteko en la mondo ricevas praktike ĉiun novan eldonaĵon en aŭ pri Esperanto.

Jen nur kelkaj el la multegaj valoraj aŭ interesaj kolektoj de BH:

- verkoj de John Wilkins (1694), Lord Monboddo (1784), C. Michaeler (1788), Bonifacio Sotos Ochando (1855) kaj G. Renaud (1862), rilataj al planlingvoj aŭ lingvokrea pensado ĝenerale;
- lernolibroj kaj vortaroj de Volapuko;
- diversaj eldonoj de la Unua Libro, kaj tradukoj de Grabowski (i.a. *La neĝa blovado* de Puŝkin kaj *La gefratoj* de Goethe);
- ĉiuj 80 libroj eldonitaj de Literatura Mondo (1931-1939) kaj la 87 titoloj de Stafeto (1952-1980).

Sed BH konsistas ne nur el libroj kaj gazetoj. Multe da spaco okupas ankaŭ nepublikigitaj manuskriptoj, vidbendoj, fotoj, afiŝoj, presitaj muzikaĵoj, eĉ insignoj kaj glumarkoj. Pro sia valoro elstaras: leteroj kaj manuskriptoj de Hector Hodler kaj Edmond Privat, korespondaĵoj inter Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien kaj — plej grave — originalaj leteroj de Zamenhof. En aprilo 1991, du jarojn antaŭ sia morto, prof. Régulo Pérez donacis al UEA sian kolekton de 57 leteroj kaj poŝtkartoj de Zamenhof kaj kelkdekon da leteroj de aliaj movadaj pioniroj.

BH ĵus riĉiĝis je aliaj dokumentoj de netaksebla valoro. Temas pri dekoj da Zamenhofaj leteroj al la eldonejo Hachette kaj al francaj esperantistoj, kaj pri pliaj dekoj da leteroj, kiujn de 1904 ĝis 1914 skribis Hippolyte Sebert al Zamenhof. UEA akiris ankaŭ arkivaĵojn de Esperantista Centra Librejo (Parizo) kaj de Louis Bastien (i.a. pri la movada skismo antaŭ la dua mond-

milito), krome imponan kolekton de presitaj raraĵoj, t.n. inkunabloj, el la frua epoko de Esperanto: i.a. la francan kaj polan eldonojn de la Unua Libro, la unuan lernolibron por litovoj (1890), plurajn kajerojn de la Zamenhofa adresaro de novaj esperantistoj, kaj binditan volumon (1892-1895) de (*La Esperantisto*).



En Biblioteko Hodler delonge ne plu regas tia ordo kiel sur ĉi tiu foto el la 70-aj jaroj.

Al kiu ni dankas tiun subitan valor-kreskon de BH? Al homo kiu dum jardekoj proprainiciate zorgis pri la savo kaj konservo de niaj kultur-trezoroj: nia franca membro Jean Amoureux en Perpinjano. Konantoj scias ke li kontribuis per fontmaterialoj

kaj tradukoj al la volumoj de Ludo-vikito, i.a. al la kromkajeroj 6 kaj 7, kiuj entenas la leterojn de Sebert al Zamenhof — tiujn kies originaloj (aŭ paŭsaĵoj) nun troviĝas en Roterdamo.

Pli frue, en majo 1994, estis akiritaj pli ol 1500 volumoj de la dana biblioteko Martin Blicher (1884-1963), kiujn lia vidvino ofertis al UEA kontraŭ simbola sumo. La valorega kolekto (kun dekoj kaj dekoj da inkunabloj) okulfrapas ankaŭ per sia senmakula stato, ĉar la posedinto ĉion lukse bindigis. Post enkorpiĝo de la libroj al BH — kiuj ofte anstataŭas malpli bone konservitajn ekzemplerojn — ni povos oferti por vendo duoblaĵojn. Tio alportos enspezojn kiuj utilos al BH, ĉar la tasko de ordigo kaj katalogado nun des pli urĝe atendas plenumon.

Se vi estas profesia bibliotekisto (aŭ studento en tiu fako) kaj deziras volontule helpi en tiuj taskoj, skribu al nia adreso en Roterdamo. Kiel ĉiam, bonvenas ankaŭ donacoj al la Biblioteka Fondaĵo de UEA.

Ulrich Lins

La Biblioteko Hector Hodler

La libro-kolekton de Svisa E-Societo, fondita en 1902, post kelkaj jaroj aĉetis Hector Hodler (Ĝenevo). En 1913 la administranto de UEA, Hans Jakob, komencis prizorgi la librojn. Post la morto de Hodler en marto 1920 ili iĝis propraĵo de UEA, laŭ lia testamento; tiam temis pri 3000-4000 bibliografiaĵoj unuoj. Kvankam la administra centro de UEA estis poste translokita unue al Anglio kaj poste al Nederlando, la biblioteko restis ĝis 1962 en Ĝenevo. Kiam UEA okupis novan domon por sia Centra Oficejo en Roterdamo, estis decidite ke la biblioteko transiru de Ĝenevo al Roterdamo.

ul

La hungara/sveda fenomeno en nia prozo

Certa *Francisko Szilágyi* en la jaro 1929 aperigis *Poemaron el Hungarlando*, kun tradukoj pri kvindeko da “vere gigantaj poetoj tra 400 jaroj” — preferante Johanon Vajda, pro komuna spleno. En “Finvorto” la tradukinto emfazas ke la verko “respegulas la bildon de la postmilita kaoso”. Modeste li prezentas last-laste unu poemon propran kaj originalan: “La bela flor’”, i.a. kun jenaj versoj:

Ektimas nun
la juna kor’,
kaj estas mond’ nur pluva plor’.
Ho, vana pent’!
Ve! Venas frost’
kaj har-argent’.

La poeto tiam estis 34-jara, do apenaŭ griziĝanta, tamen senduba melankolio radiis el lia estado en tiu epoko de senespera krizo, kiu devigis la junan doktoron kaj bank-oficiston senlaboran forlasi sian patrimon. Pri la mizeraj junaj jaroj kaj la etoso de lia elmigro troveblas kortuŝa poemo en *Esperanta Antologio*.

Allogis Svedio, kaj por fremdulo en 1932 kun Esperanto en sia bagaĝo ĝia montriĝis feliĉa elekto. Dum unu jaro Szilágyi gvidis 20 kursojn kaj faris sennombrajn prelegojn. Li venkis la melankolion ellaborante kaj praktikante rektmetodan lumbildosistemon, “gramatikante” karikaturojn de la tiutempa bildstri-figuro *Adamson*. Koncerna lernolibro aperis en naŭ lingvoj. De tiuj sukcesoj kaj samtempa eldono de originala novelaro pedagogia nur estis negranda paŝo al decido pli daŭre setli en Svedio.

Ankoraŭ tra la 30-aj jaroj Szilágyi vaste kunlaboris por la Budapeŝta *Literatura Mondo* kaj la unua eldono de *Hungara Antologio*, ofte sub la pseŭdonimoj Silabo, Silag, Sife, Fersil. Li grave kontribuis en 1937 al la Jubilea Libro *Argenta duopo*, honore al Baghy/Kalocsay, liaj du grandaj fratoj en la literaturo. Samtempe li tute nature troviĝis inter la konsilantoj/redaktoroj de *Sveda antologio*, preta por transpaŝi la sojlon al sia definitiva svedeco, kun forta ligo al la laborista movado. Tion li pravas per *Sveda Novelaro* kun verkoj specife elektitaj inter verkistoj kun malriĉula deveno, do aŭtodidaktaj, fieraj pro sia klaso, kun kiu ili klopodas solidare leviĝi, realisme ĉerpante el propraj, ofte amaraj fontoj.

Se iu dezirus konfirmon pri tiu ĉi pasia proklamo, rekomendinda specimeno povus esti “Vespera ruĝo anoncas ventegon” de Moa Martinson. Ŝia (biografia?) rakonto preskaŭ spirhaltige martelas ĉiujn sensorganojn de la leganto per furioza ritmo kaj grandioza priskribo de primitiva homa emocio kaj despero toleranta komparon kun profundoj spertitaj de l’*Biblia Job*. Per tia reverko FS ekpruvus sin inter la plej grandaj en nia prozo.

Noveloj, noveloj, noveloj!

Klare la preferata kaj ankaŭ la plej sukcesa tereno. Nefacila ĝenro, ĉar ĝi povas simili al loterio: plej troas la blankaj lotoj. Nur rarokaze falas neatendita frukto al eltenema leganto. Ferenc S. disponis riĉan avantaĝon ĝuste pro sia dunacia kultura fundamento, kaj malavare li ŝutis surprizajn kombinojn — kvazaŭ magiisto el unu maniko hungara, alia sveda:

Kvin rapsodioj
Trans la fabeloceano
La granda aventuro

Inter Sudo kaj Nordo
Humora novelaro
Koko krias jam

Inter Sudo kaj Nordo havas tute dokumentan enkondukon: “Tiu ĉi historio okazis en la jaro 1938. Mi ĵus alvenis Stokholmon el la bolanta, bruanta profundo de la kontinento. El la Danuba valo mi venis al la klara, freŝige malvarma Nordo ...”

Koko krias jam certe havas la plej elstaran kvaliton. Sur la kolofono de ties unua eldono ĉe Stafeto skribis Régulo Pérez: “*Koko krias jam* montras la novelarton de Ferenc Szilágyi en ĝia ĝis nun plej vasta gamo. Jen estas noveloj, kiuj jen agrable distras, jen ĉarmas, jen riĉigas la spiriton per pli profunda travivaĵo ... *La sekreto de la banko* estas amuza satiro tirita el la vivo, kun surpriza fino. *La vekigo* estas gaja junula aventuro pentrita sur fono de la streĉa

Runo

Nobla amiko,
nia nestoro,
perdis la plumon.
Donis dekomble
sian talenton
la nefortulo.
Ŝtone naskitaj
vane la vortoj
vindas la vundon.
Flamu nun nokte
treme nordlumoj liahonore!
Mutas nun mildo,
nudas la nesto.
Orfaj ni pluas
post la tempesto.

Poul Thorsen

(Norda Prismo, 1967, 3-4)



aktualo. La titolverko *Koko krias jam* sonigas profundajn akordojn per la dilemo de komercisto inter la magnetoj de memintereso kaj sincera humanismo; la kunteksto de la ĉeftemo kaj la angora sceno el 19-jarcenta milito estas farita kun arta ekvilibro kaj profunda efekto... *La flamsalamandro* ne celas, sur siaj 48 paĝoj, esti romaneto, sed, en sia formekonomio, estas ĝuste novelo, kies okazoplena irado katenos la leganton ĝis la lasta, potenca sceno."

Pri la stilo aldonindas ke ĝi, kiel en fabeloj, tre proksimas al leganto. Precipe unu ero ravas: *Nila*, psikoplena rakonto pri kvarjara, ĉarma knabineto, rivelita per delikata observo kaj humurveka simpatio. Merite *Nila* trovis prezenton en la antologioj 33 *Rakontoj* kaj Baza Literatura Krestomatio, krom *Trezoro*.

Kulmine aperis longe atendita romano, *Mistero Minora*, ĉe Eldonejo KOKO, Kopenhago, 1958. Ĝi prezentas krimpsikologian intrigon, en kiu mistera melodio, triviala

ŝlagro, helpe de sonĝo, interligas kaj dissolvas kelkajn ne tute verŝajnajn enigmojn. Pli ol la iomete svaga temo, kvankam erotika, interesas la kolorriĉa stilo kaj la lingvaj interpuŝigoj hungare/svede/Esperante.

Konfesendas ke spite al lingva virtuozezo en *Mistero Minora*, la Szilágyi-aj noveloj, lia analiza kapablo pri arto, kaj eĉ lia liriko superas tiun ĉi solan romanprovon.


Norda Prismo

De tute alia flanko kaj multe pli konvinke Szilágyi atingis nepran apogeon per sia iniciato kaj 12-jara redaktado de *Norda Prismo*, de kelkaj nomita la revuo kiu ne volis morti. Eleganta, ilustrita, ĝi aperis en kajeroj 64-paĝaj, 6-foje jare, kun enhavo modela por transnacia kulturo, sed fragila kiel ĉio frunaskita. La ekonomia bazo estis la tiutempe tute forta Sveda Laborista E-Asocio, kelkaj svedaj sindikatoj sponsorantaj kulturon, krom glorinda, kreditpacienca presejo en Borås, Svedio.

La unuaj du jarkolektoj ampleksas 580 paĝojn, giganta fortostreĉo de la soleca redaktoro, ĉe kiu ĉiam abundis manuskriptoj, kurioze stokitaj en ŝuskatoloj de planko ĝis plafono!


Interesas konstati kiom da novaj talentoj debutis tiam: Marjorie Boulton, Edwin de Kock, Geraldo Mattos, Eli Urbanová, Sándor Szathmári, Karolo Piĉ, John Francis, Miyamoto Masao, Armand Su, Vilmos Benczik, Zora Heide, Lorjak interjetis siajn rebrilojn tra la komuna prismo.

Dum renkonto inter Ferenc S. kaj Poul Th. en Borås estis decidita eldono de dana special-numero, kaj baldaŭ okazis plivastiĝo de la redakcio, tiel ke ĉiu nordia lando havis kunredaktoron: Johan Hammond Rosbach, Norvegio; Vilho Setälä, Finnlando; Poul Thorsen, Danio, kaj poste Georg Kustosz, Gronlando, por speciala inuita numero, 1964. Duan eldonon de tiu kajero pagis Dana Ministerio por Eksterlandaj Aferoj al siaj ambasadoj tra la tuta mondo por malavara disdono.



En Esperantio validas senkompata naturleĝo, ke literatura revuo nur kun asisto de mirakloj povas atingi 2000 abonojn por pluvivi. Tiu kritika nombro ja kelkjare estis tanĝita, sed malfeliĉe pro mondpolitikaj perturboj kaj eternaj "krizoj" tro malmultaj abonantoj troviĝis eĉ en t.n. nepagipovaj landoj.

Terura frapo estis en la jaro 1967 la morto de la ĉefredaktoro. Sed ankaŭ el tiu katastrofo troveblis vojo. Ruzpretekste, ke ankaŭ Skotlando situas en Nordio, oni sukcesis persvadi William Auld transpreni la redaktadon, kun Mogens Groth kiel redakcia sekretario, pri arto kompetenta.



La amuza karikaturulo Adamson, el *A Practical Course in Esperanto* (1959)

Tamen, pro permanenta monmanko la eldonritmo lamis, same kiel ŝrumpis la paĝonombro, ĝis proponis artefaritan spiron la finna Fondumo Esperanto. Vilho Setälä ekkaptis la torĉon kaj eldonis en 1974 la lastan numeron post eventoplena epoko de 20 jaroj.

La lasta numero? La morto estis nur ŝajna, ĉar en 1992 surprize aperis 40-paĝa *Norda Prismo*, redaktita de Jukka Pietiläinen, Jyväskylä, Finnlando. Efektive aperis plua n-ro 2/1992, kunlabore kun i.a. Jaan Ojalo, Tallinn. La presigo okazis en la estona urbo Tartu, sed tiun numeron eĉ frupagintoj ne ricevis.

Legeblas en tiuj ĉi du ekzempleroj teda debato inter la finno Lasse Kivistö kaj la italo Giorgio Silfer, Literatura Foiro. Mallonge: Silfer asertas ke Setälä vendis la eldonrajton. La samon por si certigas la finn-estonoj.

Obstinaj voĉoj murmuris pri ebla resurekto okaze de la UK en Tampere. Ĉu vere povos risorti ankoraŭ unu barakto flanke de la revuo kun la sep vivoj?

Poul Thorsen (Danio)

despero: malespero (Neologisma glosaro)

sponsoro: kunfinancanto de iu aranĝo kiu interŝanĝe rajtas reklami en ties kadro (Plena Pekoteko)

ŝlagro: laŭmoda melodio aŭ kanzono (Neologisma glosaro)

Memori pri Ferri

En mia vivĉambro staras en bela kadro duobla portreto de la tre ege karaj por mi Ferri kaj lia Rozika. Ili tie sidas sur placo en Budapeŝto dum kongreso en 1966. Ĝi estas unu el la lastaj bildoj pri ili, fotita de Edith Jensen, nun mortinta Kopenhaga samideanino. Ferri mortis jam duonjaron poste, Rozika lin sekvis post unu jaro.

Mian fraton — tiel ni nomis unu la alian — mi memoras ekde 1954. Li — tiam por mi Ferenc Szilágyi — partoprenis en la somera universitato de Frostavallen. Post la vesperaj prelegoj ni kursanoj foje pro ege bela nokta vetero partoprenis ankaŭ en nokta promenado, kiun kelkaj el ni spontanee faris laŭ iu arbora ŝoseo brak-en-brake, larĝa ĉeno de unu rando de la vojo ĝis la alia. Inter la promenantoj estis la ĉefpreleganto Ivo Lapenna, kiu kamaradece instruis nin kanti jugoslavajn kantojn en Esperanto. Ferenc kaj mi unu apud la alia kunkantis kaj ĝojis pro la agrabla etoso en vere kultura aranĝo, al kiu ankaŭ Ferenc kontribuis prelege.

Impresis min kiam mi rimarkis ke, post aŭskulto al grava prelego de Ivo Lapenna, Ferenc, kvankam pacisto, levis la manon alkape por kvazaŭ soldate saluti, kiam ni preterpasis la ĵus finintan oratoron, kiu riĉigis nin ĉiujn.

La unuan fojon kiam mi vizitis la ĉarman paron Ferenc kaj Rozika, ilia hejmo estis eta nesto plej supre sub tegmento de granda vilao en Borås. Ilia loĝejo ampleksis ne multajn kvadratmetrojn sed elradiis varmon kaj spiriton. La nevasta loko estis plena de kestetoj, kiuj funkciis kvazaŭ arkivo: multe da paperoj en formo de manusoj* kaj leteroj, ĉar li korespondis vaste kaj kosmopoliote kun homoj en la tuta mondo. Rozika, kiu labortage deforis kiel estrino en sekcio de tekstila fabriko, “sekretarie” helpis lin vespere meti ĉion sur ĝustan lokon en skatoloj kaj ŝrankoj. Ekde novjaro 1955 la geedza hejmo servis kiel redaktejo de *Norda*

Prismo. Malgraŭ la tiama kriza situacio rilate al loĝejoj en Svedio, la paro Szilágyi sukcesis en 1959 akiri alian kaj tute bonan apartamenton, tiel ke Ferri povis havi propran ĉambron por sia korespondo, verkado kaj redaktado de *Norda Prismo*, tiutempe la plej valora universala kultur-revuo en Esperanto.

Kiam mi kiel muzikisto estis survoje al diversaj engaĝigoj en Falun, Skövde, Umeå ktp., mi ĉiam vizitis ilin - foje tranoktis ĉe ili - kaj spertis agrablan tempon per multa interparolo pri temoj ankaŭ mondskalaj, pri kiuj ni ambaŭ estis vigle interesataj, sed kompreneble ankaŭ multe pri la Esperanto-movado kaj -agado en nia diaspora kadro.

Li kiel Akademia membro sentis sin responsa precipe pri lingva ĝusteco en *Norda Prismo*, tamen li vaste respektis la lingvouzon de la multaj kontribuantoj al la revuo, se ili nur verkis fidele agantaj al kaj ne pekis kontraŭ la Fundamento. Sed li ne agis kiel rigora prusa generalo, ne volis unuformigi la lingvaĵon, igi ĝian uzon stereotipa.

En la fino de 1964 mi — kune kun grupo da interesatoj en Kopenhago — transprenis la eldonadon por eviti ke ĉesu *Norda Prismo* aperi, ĉar mi trovis ĝin tre savinda.

Tiu periodo de dua dekada estis vere enhavoriĉa sed — bedaŭrinde — ankaŭ doloriga kaj nervoziga. Tute nenecesaj ĝenoj ekzistis pro cirkonstancoj rilate al mono, pago kaj pro kreskantaj kostoj de presado kaj afranko. Ni nepre ne volis rezigni pri *Norda Prismo* — kortuŝa estis la korespondo inter Ferri kaj mi koncerne ĉion ĉi. Ni estis optimismaj homoj, sed ofte sentis ke ni estas melankoliaj tiaj, tamen esperaj.

Plurfoje Rozika kaj Ferri tranoktis ĉe mi, kiam ili survojis ien por kongresi aŭ ferii. Ni sentis nin familio kaj gefratoj.

Li ne estis alta laŭstature, sed lia korpa trunko portis belformajn kapon kaj vizaĝon, kaj liaj helbluaj okuloj lumis agrable kaj amikece, tamen ili povis fulmi kolere, kiam li aŭdis pri maljusteco.

Iam karmemora Paul Neergaard kaj Torben Kehlet donacis al la dana “Amikaro de Norda Prismo” diversajn helpilojn kaj ŝrankon por pli facile teni manusojn, klišojn kaj korespondataĵojn. Kiam dum vizito Ferri vidis tion, li — strange kaj emocie — citis versojn de poemo:

La paseoj nin koncipis kaj mamnutris, sed hororigas,
el la nuno ni rifuĝas al esperata futur’.

Sed momentbilono de l’ homvivo, kun la paseoj,
kaj kun la futur’ revata, estas por ni tuta eon’.

Tre mallongan tempon vivas la matena guto de roso,
sed dum ĝi ekzistas, en ĝi respregulas sin la ĉiel’.

(Kálmán Kalocsay: “Letero al William Auld”)

Kara Ferri estis silenta heroo. Li luktadis por ke *Norda Prismo* daŭrigu malgraŭ monto da malfacilaĵoj, pri kio li verkis:

Mi spitu ĉion, daŭre, mi daŭrigu nun!

Senkulpa trans tim’, minaco, pun’:

Sed diru, mia mem’ — kien iri nun?

Kvankam por li kaj lia Rozika la tiama epoko estis ĝojiga kaj interesa, ĝi tamen prezentis al ni multajn ĉagreniĝojn nenecesajn, kiuj fakte igis nin suferi anime, kaj kiuj parte detruis nian sanstaton.

Sed Ferenc Szilágyi daŭrigis ĝis lasta sia spiro!

Mogens Groth (Danio)

*manuso: manuskripto, en la redakcia lingvouzo de *Norda Prismo*

Kilimanĝaro kronos Kvaran Afrikan Kongreson


La ĝisnunaj tri Afrikaj Kongresoj okazis en okcidenta Afriko. La kvara (KvAK) saltos orienten, al la plej alta monto de la kontinento, Kilimanĝaro.

Invitas la juna kaj vigla Tanzania Esperanto-Asocio, kiu deziras kunvoki inter la 28-a de decembro 1995 kaj 2-a de januaro 1996 tanzanianojn,

Parko Aruŝa. Ĉiu neafrikano per sia kotizo iĝos patrono por unu tanzaniano, kiu kompreneble pagos nur malgrandan onon de la kotizo.

kongresanoj ekster Tanzanio iru al la adreso de la CO en Roterdamo. Loka kontaktadreso: Tanzania E-Asocio, s-ro Costantine Mashauri (sekretario), P.O. Box 23390, Dar-es-Salaam, Tanzanio.

Se vi volas regali vin per ekvatora pejzaĝo — tamen kun Kilimanĝara neĝo — dum la tagoj de la venonta jarŝanĝo, petu la aliĝilon de KvAK ĉe la CO. Vi ne nur spertos unikan kaj spektaklan vojaĝon, sed ankaŭ helpos la junan E-movadon en Afriko. Se vi mem ne povas vojaĝi tien sed ja volas helpi junajn afrikajn esperantistojn fari



aliajn afrikanojn kaj — kompreneble — gastojn el la tuta mondo al kuna festado, ekskursado kaj diskuto de la temo “Imagoj pri Afriko: Kontinento de espero aŭ de malespero?”

Tanzanio estas lando plenplena je spektaklaĵoj: ĉi tie situas la plej imponaj naturaj vidindaĵoj de Afriko. Zanzibaro logas per plaĝoj, bazaroj, kaj la spicoj de 1001 noktoj. Tiujn vidi ĉiam eblas, sed la kongreso donos okazon faciligi la vojaĝon kaj riĉigi ĝin per kontaktoj kun tanzaniaj samideanoj.

La kongresejo estos la Internacia Lernejo en Moshi, ne longe for de la internacia flughaveno Kilimanĝaro. Tiu loko ofertas matene rigardon al la majesta monto, tuttage ĉiujn kongresbezonaĵojn, bonajn, variajn manĝojn, naĝbasenon, infanludejon kaj sportkampojn. Disponeblas renkontiĝejoj por ĉiaj bezonoj kaj unu- aŭ dultitaj studentaj ĉambroj por la nokto.

La kotizo de 620 guldenoj inkluzivas ses noktojn en la kongresejo, plenan manĝon dum ses tagoj, la programon, kaj tuttagan ekskurson al la Nacia

Post la kongreso grupo dum kvin tagoj migros (prezo: 690 guldenoj) al la pinto de Kilimanĝaro (5895 m) por tie planti la verdan flagon; aliaj vizitantoj akompanos tanzanianojn al iliaj hejmurboj por kelkaj tagoj. Eblos vizitoj ankaŭ al aliaj naciaj parkoj (ekz. tendo-safario kostas 620 guldenojn por tri tagoj). Eblos ankaŭ (aŭ anstataŭe) viziti Daresalamon, Zanzibaron ktp. La organizantoj de la kongreso pretas helpi en la aranĝado de individuaj itineroj.

La Centra Oficejo de UEA planas organizi karavanan flugon el Amsterdamo la 26-an de decembro, kun reflugo principe la 9-an de januaro, je la prezo de 1980 guldenoj. Depende de la kvanto de aliĝoj el difinita lando, ni verŝajne sukcesos akiri favoran prezon ankaŭ por la konektaj flugoj al/de Amsterdamo.

Aliĝoj kaj demandoj de

tion, sendu donacon aŭ donaceton al la konto “kvar-z” ĉe UEA. Antaŭdankon! ★

Post *Mi vizitis grandan urbon*
la juna togolanda esperantisto
Gbeglo Koffi
denove ĝojigas
tiujn, kiuj volas
scii pli pri la
vivo en afrika
lando.

**De
vilaĝo
al ĉefurbo**

Eldonis Fondaĵo Afriko de UEA. 32p.
Prezo: 8,10 gld. (triona rabato ekde 3 ekz.)
Mendu ĉe UEA.

Pentekoste en Parizo

La Dua Eŭropa Esperanto-Unia Kongreso okazis en la franca ĉefurbo inter la 2-a kaj 6-a de junio.

Samtempe kaj samloke estis aranĝitaj la naciaj kongresoj de la francoj, italoj, germanoj [vd. "Loke", p. 137] kaj britoj. Ĉeestis pli ol 450 homoj el 24 landoj, do ne nur el Eŭropa Unio.

"Komuna lingvopolitiko por multkultura Eŭropo" estis la kongresa temo, kaj la organizantoj dediĉis al ĝi tri sesiojn. Unue, tuj post la inaŭguro, prelegis Claude Piron pri "La kaŝitaj perversaj efikoj de la nuntempa sistemo de internacia komunikado"; li atentigis pri la hororaj kostoj de tradukado en eŭropaj instancoj. La dua sesio estis publika forumo, kaj la trian konsistigis strategia prelego de Gian Carlo Fighiera

pri "Esperanto preter la jaro 2000". Okazis ankaŭ pluraj fermitaj kunsidoj de Eŭropa Esperanto-Unio.

La rezulto anonciĝis al la kongresanaro dum la fermo (fakte, post ĝi, pro teknikaj malfacilaĵoj): post iomega konfuzo kaj fŭsa disputado oni akceptis rezolucion kiu konstatas la eŭropan lingvan situacion kaj rekomendas planlingvon (aparte Esperanton) kiel neŭtralan solvon (vd. ĉi-apude).

En tiom multnacia evento estis do surprize ke mankis interesaĵoj. Tio kiom oni organizis, certe ne tediis: Trixini faris amuzan magian prezenton, la nederlanda ĥoro Akordo (sep gejunuloj) kaj la franco Ĵak Le

Puil kantis plaĉe, kaj la tuta ĉeestantaro kune fotiĝis dum iomete kontraŭleĝa enaerigo de balonoj.

Okazis ankaŭ pluraj postkongresaj ekskursoj — al lokoj kiel la Versajla kastelo kaj la Pariza Disnejlando. Sed verŝajne la plej atentokapta aranĝo estis tre lerta elmonstro de okdedo da muzikaj instrumentoj el 17 landoj, kiujn ilia posedanto Hervé Gonin pacience ludis por la vizitantoj. Tio okazis en la kvina etaĝo de la kongresejo, do eble kelkaj maltrafis ĝin!

Resumaj pensoj: tiu ĉi estis kongreso interesa pro la homoj, sed agaca pro la fuŝaĵoj. Multaj grumblis pro la magreco de la t.n. "riĉa libroservo"; la aligistino ŝajne ne kapablis paroli Esperanton; kaj la ĉeestintoj ne facile forgesos la "Batalon pri la Rezolucio".

La sekvan Eŭrop-Unian Kongreson (1997) aranĝos Germana E-Asocio, en Stuttgart.

Simon Davies, Johano Rapley kaj Duncan Thomson (Britio)

Lingvopolitiko por multkultura Eŭropo Deklaro pri lingva kaj kultura diverseco en la Eŭropa Unio

Ĉiu lingvo kaj kulturo esence havas egalan valoron. Konservado de kultura kaj lingva diverseco estas antaŭkondiĉo por sana kaj paca internacia kunvivado.

En la landoj de la Eŭropa Unio la bezono garantii egalrajtecon de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj estas aparte evidenta. Intensa internacia kunlaboro unuflanke pozitive antaŭenigas internacian kompreniĝon, sed aliflanke la evoluo ankaŭ povas minaci diversecon pro tendencoj al centrigismo kaj kultura unuformigo. En tiu ĉi kunteksto ni sentas ke la lingvoproblemo estas aparte akuta kaj bezonas seriozan kaj novpensan atenton. Por ebligi unuecon en diverseco ni proponas lingvopolitikon por multkultura Eŭropo.

La lingvoproblemo ludas gravan rolon en la kontaktoj aŭ nekontaktoj inter civitanoj de la Eŭropa Unio, estas konstanta partoprenanto en la kunsidoj de la Unio kaj ĉeestas en la ĉiutaga laboro de la institucioj. La demando pri la lingvoj leviĝas en multaj kuntekstoj. Aktualaj demandoj estas ekzemple:

- kiu lingvo aŭ kiuj lingvoj estu uzataj sur la planata eŭropa mono?
- kiulingve la Eŭrokorpusaj trupoj ricevu siajn ordonojn?
- kiel aliri la demandon pri la lingvoj en pligrandiganta Eŭropa Unio?

Por plene respekti la lingvan kaj kulturan diversecon kaj la egalrajtecon de ĉiu lingvo en la eŭropa kunlaboro... ni vidas du alirojn:

1. ĉiama paralela uzo de ĉiuj lingvoj;
2. uzo de unu lingvo kiel internacia komunikilo.

Neniu nacia lingvo povas daŭre plenumi la rolon de sola komuna lingvo sen endanĝerigi la lingvan kaj kulturan diversecon kaj eĉ la politikan stabilecon de la Unio.

Neŭtrala, demokratie akceptebla solvo povas esti nur la latina lingvo aŭ internacia planlingvo... speciale ellaborita por egalrajta internacia komunikado sen minaco al lingva diverseco.

Ni subtenas la strebojn al plurlingveco, sed konstatas ke la nuna politiko kun dek unu laborlingvoj, kvankam subteninde strebanta al lingva egalrajteco, ne kapablas atingi sendiskriminacian lingvouzadon. Praktike superregas iuj lingvoj, en la eŭropaj institucioj same kiel en la lingvoinstruado. Uzo de internacia planlingvo ebligus egalan pozicion de ĉiuj lingvoj. Tiel atingeblos vera lingva diverseco. Ne plu necesus limigi la lernadon de fremdaj lingvoj al iuj superregaj lingvoj, sed eblus libera elekto de lingvoj — la lingvoj de najbaraj landoj aŭ aliaj pro speciala intereso.

Tial, kvankam konsciaj pri la grandaj komencaj malfacilaĵoj kaj pri la neceso de transiraj aranĝoj, ni konsideras la uzon de internacia planlingvo la sola realisma maniero por garantiado de la lingva kaj kultura diverseco.

Pro tio ni volas atentigi pri la neceso:

- efektiviĝi eksperimentojn sub rigora scienca kontrolo pri diversaj utiligeblaj de internacia planlingvo (en lernejoj, universitatoj, eŭropaj institucioj ktp);
- serioze pristudi la diversajn kontribuojn kiujn povus fari internacia planlingvo por la malpezigo de la lingvoproblemo laŭ mallonga, mezlonga kaj longa perspektivoj, kun speciala atento al la atingoj de la Esperanto-movado;
- starigi altrangan stud- kaj laborgrupon pri lingvopolitiko por multkultura Eŭropo, por serioza pritrakto de la lingva problemoj.

Akceptita esperantlingve de Eŭropa Esperanto-Unio en ties dua kongreso, en Parizo, 2-6 junio 1995, kun 500-opa partoprenantaro el 24 landoj

Tria lingvo por tutmondiĝo

La Koreaj Lingva Societo, Fonetika Asocio kaj E-Asocio kunorganizis la 15-an de aprilo "Simpozion pri la lingva problemo".

La simpozio aŭspiciis la konata taggazeto *Chonsun* kaj UEA, kies prezidanto John C. Wells gratulmesaĝis memorigante pri sia proksima rilato al la tri kunorganizantoj.

Antaŭ sepdeko da homoj unue prelegis prof. d-ro Lee Hyunbok, prezidanto de Korea Fonetika Asocio. Li kritikis ke la lingvoinstruado en Koreio ĝis nun neglektis la sonan aspekton de lingvo. Li ankaŭ kontraŭis la planon de la korea registaro ekinstrui la anglan lingvon jam en la tria klaso de la elementa lernejo.

Prof. d-ro Heo Ung, prezidanto de Korea Lingva Societo, atentigis pri la negativa flanko de tutmondiĝo, kiu "angligas homojn" kaj lingvojn. Ambaŭ konataj lingvistoj opiniis ke por vera tutmondiĝo necesas tria lingvo, kiun ĉiuj homoj povus egale uzi, kaj ke Esperanto plenumas tiun kondiĉon.



Laste prof. d-ro Lee Chong-yeong, prezidanto de Korea E-Asocio (vd. foton supre), prelegis pri Esperanto kiel "Komuna lingvo de la mondo". Li skizis la necesecon kaj kondiĉojn de monda komuna lingvo, kaj alvokis registarojn kaj internaciajn organizojn al serioza pristudo, enkonduko kaj disvastigo de Esperanto.

Choe Taesok (Koreio)

Planlingva enciklopedio

Tradicie, en Svisio la agado por la plej diversaj planlingvoj ĉiam forte prosperis. Konsidere al tiu fakto, en 1992 estis lanĉita plurjara laboro por kompili enciklopedion pri la historio kaj adeptoj de planlingvoj en Svislando. Jam kolektiĝis biografiaĵoj pri kelkcent personoj — ne nur esperantistoj, sed ankaŭ reprezentantoj de Volapuko, Ido, Interlingua ktp. Oni verkas historiajn skizojn pri la unuopaj planlingvaj movadoj en Svislando. Por akiri la bezonatajn sciojn, konsultiĝas bibliotekoj, stariĝas kontaktoj kun informantoj. Estas dezirinde ke la ampleksa entrepreno rezultu libroforme en 1998, cent jarojn post la unua publika parolado pri Esperanto en Svislando. La kompilanto kaj redaktoro de la eldonota verko estas la svisa interlingvisto Andy Künzli (Zumhofstrasse 22, CH-6010 Kriens LU, Svislando).

Alternativoj por la lingvoservoj de UN

Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA kunaranĝis en majo eĉ du konferencojn teme ligitajn al la lingvaj aspektoj de la 50-jariĝanta UN.

Lingvoj en internaciaj organizaĵoj: duonjarcento da internacia ordo?" estis la temo de la 13-a Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, kiun kune organizis en Novjorko, la 5-an de majo, CED kaj la Fako pri Konferencaj Servoj de UN. La konferenco pritraktis la historion, nuntempon kaj estontecon de la lingvaj servoj de UN, kie ses lingvoj estas regule uzataj en la laboroj, kaj ĉiuj gravaj dokumentoj aperas en ĉiuj ses lingvoj.

La konferencon malfermis Françoise Cestac, iama asista ĝenerala sekretario de UN respondeca pri la lingvaj servoj; ŝia posteulo, Federico Riesco, prezentis la nunan staton de la servoj. Historian trarigardon, ĉefe pri interpretado, liveris d-rino Margareta Bowen, kiu parolis pri la Ligo de Nacioj; Elizabeth Hayward, kiu prezentis siajn memorojn pri la fruaj jaroj de UN; kaj Bruce Boeglin, kiu lastatempe revenis post deĵoro en Bosnio.

Aliaj parolantoj pritraktis proble-

mojn de evoluigo de terminoj, komputiligo de la lingvaj servoj, kaj rilatajn temojn. Fine prof. Timothy Reagan kaj prof. Humphrey Tonkin parolis pri la estonteco. Tonkin sugestis diversajn alternativajn alirojn al la liverado de lingvaj servoj, i.a. utiligon de Esperanto. D-ro Kurt Müller aldonis fermajn rimarkojn.

Tonkin atentigis ke funkciuloj en la lingvaj servoj emas akcepti la sistemon tia kia ĝi estas, kaj okupiĝi ĉefe pri plibonigoj ene de la nuna baza konsisto. Sed efektive necesas multe pli drasta reekzameno de la tuta sistemo, i.a. ĉar la nuna sistemo nur parte faciligas komunikadon, kaj ĉefe ekzistas por subteni difinitan disdividon de politika potenco.

Humphrey Tonkin (Usono)

Al lingvistika politiko: estonteca perspektivo ĉe Unuiĝintaj Nacioj" — titoliĝis tritaga kolokvo kiun Kanada Centro pri Lingvaj Rajtoj kunorganizis kun CED, ĉe la Uni-

versitato de Otavo (Kanado), de la 25-a ĝis la 27-a de majo.

Inter la trideko da invitataj prelegantoj parolis du elstaraj esperantistoj: Humphrey Tonkin kaj Claude Piron. Tonkin malfermis la kolokvon per prelego ligita al la ĉeftemo, "Lingva hierarkio ĉe Unuiĝintaj Nacioj: ties pravigo kaj dinamiko". Li instigis fundan diskutadon pri Esperanto dum tiu mateno kaj poste.

La kolokvon ne nur malfermis, sed ankaŭ fermis esperantisto: Claude Piron prelegis pri "Esperanto: nuntempa statuso kaj estonta promeso". Li eĉ senmoke gratulis la organizantaron pro ties kuraĝo inviti lin paroli pri Esperanto. Spite al tempomanko, Piron lerte, amuze kaj konvinke preparolis la estontecon de Esperanto, ĝiajn sukcesojn intajn kaj antajn. Demandite kiel sonas tiu lingvo, li senhezite ekparolis en Esperanto, montrante al la ĉeestantaro iun punkton gramatikan...

Raymond Brisebois (Kanado)

Vibroj kaj libroj en Kroatio

Ekde la komenco de la milito en 1991, ne plu aperadis *Tempo*, kvaronjara gazeto de Kroatia E-Ligo (KEL). Sed jen ĝi denove, sur brila papero, kun riĉa enhavo: ĝi helpis nin revui kelkajn erojn de la E-vivo en Kroatio.

Amruseva 5/1, HR-41000 Zagreb (tel. +358/1/424-660; retpoŝto iivaci@oleh.srce.hr): jen la tradicia adreso, kie atingebblas Dalibor Seatović, redaktoro de *Tempo* kaj nova sekretario de KEL. Tie daŭre hejmas ankaŭ Kroatia E-Junulara Asocio (KEJA), Studenta E-Klubo (SEK) kaj la Zagreba klubo Bude Borjan — kies programo ĉiumerkrede anonciĝas en ĉefa Zagreba gazeto. Sed ne plu tie funkcias Internacia Kultura Servo (pp 499, HR-41000 Zagreb), kiu en 1994 fariĝis ŝtata kultura instanco kaj en marto translokiĝis al nova ejo, kulturcentro kun multaj lokaloj diversfunkciaj. Ankaŭ la Esperantaj organizoj devos iam forlasi “Amruŝevan”, sed dum vicurbestro Božo Biškupić zorgas trovi novan lokon, ili daŭre rajtas uzi la ejojn tie.

KEJA aranĝis en aprilo internacian kulturalan renkontiĝon kun sepdeko da estoj el dek landoj, laŭnome “Mezepokan”

pro la historieco de la gastiga kastelo Trakoŝćan. En aŭgusto (15-27) KEJA organizos dusemajnan aktivulan trejnseminaron de TEJO, en la bieno de Spomenka Ŝtimec.

Apartan laboron gvidas Judita Rey Hudeček, kunage kun la germana Emagiisto Trixini, por helpi invalidajn infanojn enkadriĝi al la socio. Tiun projekton subtenas vendoj de la germana eldono de *Kroata milita noktlibro* de Spomenka Ŝtimec.

Libroj po milo(j)

Ŝtimec nuntempe atendas reeldonon ĉe Edistudio (Pizo) de sia populara romano, *Ombro sur interna pejzaĝo* (1984), kaj verkas prozaĵon kun la labortitolo *Tena — folioj por Mezeŭropo*, eldonotan verŝajne de Pro Esperanto (Vieno). Pro Esperanto ĵus reprenis ŝian eseon *Tibor Sekelj — pioniro de la dua jarcento* (1989), kiu aperos mallongigite kiel ĉapitro de kroatlingva monografio, “Tibor Sekelj — aliaj homoj kaj regionoj” de etnologo Sanja Lazarević.

Alia kroata libro, esperantigita de Lucija Borčić, aperis ĉe la germana MZ-Eldonejo de Harald Schicke: *Mi resanigis PPPetron* de Pero Ĉimbur estas persona rakonto pri kuraciĝo el balbutado.

La plej furora eldonaĵo el Kroatio, kiel atendeblas, montriĝis *Asteriks, la gladiatoro*: nova volumo kun la bildstria heroo Asteriks (tradukis Nedeljko Korasić, kontrolis R. Moerbeek). La eldonejo Izvori, kiun posedas la esperantisto Damir Mikulić (aŭtoro

de *O kaj aliaj rakontoj*), surmerkatis 1 000 ekzemplerojn. Por komparo: la “prototipa” *Asteriks la gaŭlo* (1979) de Eldonejo Delta disvendiĝis laŭdire 8 000-oje! Nemirinde, do, ke *Asteriks, la gladiatoro* jam preskaŭ tute elĉerpiĝis. (La Libroservo de UEA ankoraŭ vendas kelkajn dekojn.) Tamen, neaĉetintoj povos konsoliĝi per novaj Asteriks-kajeroj, kiuj baldaŭ sekvos.

Laŭ Tempo, Spomenka Ŝtimec kaj Letero el Zagrebo



Asteriks kaj Obeliks denove en la Esperanta areno! Preskaŭ mil homoj kuris ĝin aĉeti, eĉ perdante la sandelojn.

Esperanto

Vienon oni mutigas

La Esperanto-programo de Radio Aŭstrio Internacia ne plu estas ricevebla, de pluraj semajnoj, en Azio, Afriko, Ameriko kaj Aŭstralio.

Kun po 50 minutoj da elsendotempo en semajno (25-minutaĵo dufoje sendita), tiu Esperanto-programo fariĝis tre populara kaj respektata en la tutmonda aŭskultantaro: pro siaj neŭtraleco, alta kultura nivelo, teama kaj simpatia etoso. Tre gravas la informoj pri Aŭstrio, rekte disaŭdigataj el la lando mem, fare de aŭstroj.


Estas do skandalo ke la dissendadon al mondpartoj aliaj ol Eŭropo oni simple eliminis.

La Esperanto-redakcio de Radio Vieno dum 1994 ricevis 1359 sendaĵojn, dum ekzemple al la franca redakcio, kiu disponas po 11h 10 da elsendotempo, alvenis 1988 poŝtaĵoj. La araba redakcio, kiu elsendas same dum 50 minutoj en semajno, ricevis 1 korespondadon!

Ni kredas ke indas reagi, el ie ajn en la E-parolanta mondo, por peti ke Radio Aŭstrio Internacia denove dissendu ekster Eŭropo sian Esperanto-programon. (Ankaŭ eŭropanoj estas invitataj, pro solidareco kun alikontinentaj aŭskultantoj, reagi pri tio.) Atentu, neniel utilas refoje skribi pri tio en Esperanto al la Esperanto-redakcio: tiu ĉi mem suferas la problemon! Plej taŭge estas turni sin rekte al la intendanto de la aŭstra radio, skribante en nacia lingvo (prefere germana, angla, franca, hungara). Do, se vi deziras helpi kaj subteni Radion Vieno, sendu propran personan leteron, uzante la ĉi-subajn aŭ/kaj aliajn argumentojn, al: **Prof. Paul Lendvai, Intendant ORF International, AT-1136 Wien, Aŭstrio.**

Ĉu la ĉeso de Esperanto-elsendo al kvar kontinentoj signifas ke la inten-

en radio



Esperantaj radio-elsendoj per satelito

Kompletigo kaj korekto al la tabelo en majo 1995

Pola Radio: Eutelsat II-F6, 13 gradoj oriente, TVPolonia, 11 474 GHz, polarizado H(orizontala), aŭdofrekvenco 7,56 MHz

Radio Vatikano: Eutelsat II-F1, 13 gradoj oriente, MBC, 11 554 GHz, polarizado H, aŭdofrekvenco 7,74 MHz

Finna Radio (dum la UK en Tampere): Eutelsat II-F1, 13 gradoj oriente, DWF, 11 163 GHz, polarizado V(ertikala), aŭdofrekvenco 8,10 MHz
Esperable ankaŭ RAI (Romo) baldaŭ elsendos sian E-programon satelite (Eutelsat II-F6, 13 gradoj oriente, RAI Due, 11 445 GHz, polarizado V, aŭdofrekvenco 7,56 MHz). Petu tion de la direktoro de RAI Internacia: C.P. 320, Centro Corr., IT-00187 Roma, Italio. Fakso: +39/6/33-17-18-95.

Loke, fake

“La 9-an de julio surondiĝos la elsendo numero 2000 ekde la komenco de regulaj E-programoj. Nia redakcio konservas ĉiujn tekstojn de niaj elsendoj: temas pri 18 dosierujoj (unu por ĉiu jaro) kun po pli ol 300 paĝoj” — raportas programfolio de Radio Vatikana. Gratulon!

La E-programo de Radio Aŭstrio Internacia havas ekde julio ĉi-jare novan redaktoron: Katinjo Fetes-Tosegi. Por fidelaj aŭskultantoj de la E-lingvaj elsendoj el Vieno ŝi ne estas novulo. Jam ekde novembro 1992 ŝi volontule faris programvidan kaj redaktan laboron, anstataŭante d-ron Karl Beckmann, kiu pro sankauzoj pli kaj pli retiriĝis. (Helmut Brath)

dantejo mem agas por la ĉeso de la aŭstra neŭtraleco? Ĉu eblas ke Radio Vieno tiel flankenlasus altan kulturan servon ĉiudimanĉe? Ĉu ORF Internacia subtakas la informadon pri Aŭstrio al internacia komunumo tre aktiva en la mondo favore al paco, justeco kaj amikeco inter la popoloj?

Tre utilas ankaŭ direktiĝi al ambasado de Aŭstrio en via lando. Se vi skribas nur al la ambasado, klarigu ĉion petante ke ĝi intervenu ĉe Radio Vieno. Se vi skribas ankaŭ al s-ro Lendvai, informu pri tio la aŭstran ambasadoron, petante ke li subtenu vian peton kaj indikante la adreson de la intendanto.

Günther Becker, Girolamo Lucchetta, Edmond Ludwig, Floréal Martorell kaj Bruno Masala, nome de Amikaro de Esperanto en Radio (AERA)

Esperanto el Sarajevo

Vol. 2

Elsendoj de Radio Sarajevo en Esperanto
oktobro 1994 – januaro 1995

Por ke aŭdiĝu la voĉo de Sarajevo

Multaj jam scias ke Radio Sarajevo elsendas ekde aŭgusto 1994 ĉiusemajne en Esperanto. Sed kiuj preparas ĝian programon, kaj kiel?

Temas pri tripersona esperantista redakcio kun ĵurnalisma sperto: Mustafa Resulović, eks-redaktoro de internaci-politikaj programoj de Radio Sarajevo; Zijo Ajdinović, prezidinto de E-Ligo de Bosnio-Hercegovino kaj gvidinto de ties informa fako; kaj Azra Ĉolić, redaktoro de la asocia bulteno *esperbih*. Regule kunlaboras Senad Ĉolić, prezidanto de ELBiH.

La E-redakcio ne troviĝas en la organiza skemo de Radio Sarajevo; ĉi tiu ja donas teknikajn servojn kaj programtempon, sed ne financas la agadon. La sorto de la E-elsendoj dependas de niaj fortoj kaj entuziasmo. En la nunaj kondiĉoj ni frontas mankon de papero, tajpobendoj, kraĵoj, sonkasedoj ktp. ktp. Tial ni bonvenigus ĉian materian helpon. Eble vi povus ankaŭ peti helpon nianome de ĵurnalistaj organizoj kaj sindikatoj. Se vi bezonas pliajn detalojn, telefaksu al ni per +387/71/455-141 aŭ 455-855.

Mustafa Resulović
(laŭ Internacia Ĵurnalistoj)

Esperanto el Sarajevo: 16 elsendoj de Radio Sarajevo en Esperanto, inter aŭgusto 1994 kaj januaro 1995. 2 x 60 min. 30,00 gld.

Nur piednoto en Jackson-HIStorio

Kiel ni notis en januaro (p. 13), Michael Jackson estis iel uzonta Esperanton por sia nova disko, *HIStory* ("[Lia] historio"). Ĉe la tutmonda lanĉo de *HIStory*, en junio, tamen montriĝis ke la rolo de Esperanto estas tre malgranda.

Bernice Garrett, usona UEA-delegitino, konfirmis al ni ke oni ja dungis ŝin por "traduki anglan parton de la videoklipo jam registrita Esperante en Hungario, por ke la redaktistoj de la sonstudio, Soundelux, povu redakti ĝin". Krome, ŝi instruis en Holivudo Esperantajn frazojn ("Mikaelo, Mikaelo, Mikaelo"; "Mi amas vin, Mikaelo"; "Vi estas bela, Mikaelo") al kelkaj gejunuloj, kies laŭtajn kriojn oni registris por amaso-scenoj. Estis surbendigitaj ankaŭ kelkaj esprimoj "similaj al tiuj uzataj de policanoj", kiujn ŝi instruis al du viroj. Ŝi tamen "tute ne scias kiom da ĉio ĉi restas en la fina versio".

Restis certe du Esperantaj frazoj. En la komenco de unu el la videoklipoj akompanantaj la lanĉon de *HIStory*, sufiĉe klare aŭdebla, senakcenta vira voĉo diras: "Diversaj nacioj de la mondo konstruas ĉi tiun skulptaĵon en la nomo de tutmonda patrineco kaj amo kaj la kuraca forto de muziko". Dum tio oni aŭdas kaj vidas homojn ĉe metal-produktaj fornoj, kiuj faras grandan kvinpintan stelon metalan (ne verdan), poste videblan sur la brako de la menciita skulptaĵo: plurcent metrojn alta statuo de Michael Jackson mem. Dum la laborado aŭdiĝas la alia E-lingva frazo, "Venu ĉi tien": iu krias ĝin, sed ĝi ape-naŭ distingeblas pro granda bruado en la fono.

Ĉi tion ni eksciis de Diana Babec (Germanio), kiu vidis kaj surbendigis la videofilmeton. ★



Kalendaro 1995-1996

Ĉi-sube sekvas daŭrigo kaj kompletigo de la aranĝo-listo aperinta en nia marta numero (p. 49-51). Informoj pri eventoj tie anoncitur estas nur parte ripetataj.

konstante

Poprad = Regiona Esperanto-Centro, Sobotské nám. 6, SK-058 01 Poprad, Slovakio; tel. +42/92/32-419

julio

22-29: 80-a Universala Kongreso de Esperanto, Tampere, Finnlando (CO de UEA, adreso en la kolofono)

29-04: 29-a Konferenco kaj 3-a Gimnazio de ILEI, Övik, Finnlando (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl.455, SE-242 94 Hörby, Svedio; temo: "La prope-deŭtika valoro de E-o")

31-07: 51-a Internacia Junulara Kongreso, Sankt-Peterburgo, Rusio (51-a IJK, p.k. 34, RU-117071 Moskvo; tel. +7/095/246-09-32 kaj 243-74-56; faks. 292-65-11, kun indiko "box 12701"; retpoŝto: ijk@junior.msk.su kaj ijk@amhold.msk.su; temo: "Aktivismo: junularo, kiu ne nur dancas")

aŭgusto

01-08: Junularaj E-kursoj, Prago, Ĉeĥio (Renata Beranová, Svatoplukova 43, CZ-78401 Cervenka; por komencantoj en la germana, itala kaj nederlanda, kaj perfektiga kurso internacia)

05-12: 17-a Renkontiĝo de E-istaj Familioj, Tata, Hungario (Anna Besenyei, Szerémi út 21, IV 20, HU-1117 Budapest)

07-11: 6-a Mezusona Somera E-kursaro, Detroit, Usono (Sherry A. Wells, P.O.Box 1338, Royal Oak MI 48068-1238; tel. +1/313/543-52-97)

08-14: 3-a Mezeŭropa kaj 9-a Internacia Junulara Semajno, Tata, Hungario (Edit Lindworm, Lajtha L. u. 1, IX/56, HU-1203 Budapest; temo: "Junularo kaj ekologio")

11-13: Roza Monto '95, junulara semajnfino, Stokholmo, Svedio (Kajsa Larsson, Lilla Sällskapet's väg 50 NB, SE-127 61 Skärholmen; tel. +46/8/974-626)

11-14: 14-a Komuna Seminario de gejunuloj ĉinaj, japanaj kaj koreaj, Tianjin, Ĉinio (Ĉina Junulara E-Asocio, P.O.K. 825, CN-100037 Beijing; tel. +86/1/832-66-82; faks. 832-18-08; temo: "Junularo kaj tradicia kulturo")

12-18: 35-a Internacia Somera Lernejo, Barlaston, Britio (Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs., ST12 9DG; tel. +44/782/372-105)

13-26: Internacia Rearbariga Tendaro, Noĉe, Togolando (AFANTCHAO-BIAKOU Yao, B.P. 20225, Lomé)

14-25: Cseh-kurso por komencantoj, Århus, Danio (Wolfgang Kirschstein, Hvedbjergvej 30, DK-8220 Brabrand; tel. +45/86-25-69-60; instruas Atilio Orellana Rojas)

15-27: Aktivula trejnseminario de TEJO, Hrašćina-Trgovišće, Kroatio (Klaus Dahmann, Riemenschneiderstr. 2 Zi. 57, DE-53175 Bonn, Germanio)

16-23: Internacia Arkeologia Laborkampo, Blera, Italio (Pier Luigi Cinquantini, via Dante Alighieri 2, IT-01010 Blera)

19-20: Landa Kongreso de Islanda E-Asocio, Rejkjaviko, (Islanda E-Asocio, Pk. 1081, IS-121 Reykjavík)



12-a Internacia Festivalo,

27 decembro - 3 januaro, Germanio

21-23: Sesio de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, Lomé, Togolando (Tietti-Instituto, B.P. 13169, Lomé)

21-27: 4-a Somera Tendaro, Mártély, Hungario (Medicina E-Fakgrupo, Katalin Faragó, p.k. 89, HU-6801 Hódmezővásárhely)

21 aŭg. - 13 okt.: Oksemajna kurso por komencantoj, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Folkhögskola, Lars Forsman, Fako 192, SE-691 24 Karlskoga; tel. +46/568/50-360; faks. 37-077)

27-03: 15-a Somera Universitata Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj, San-Marino (Sekretariejo, Kleinenberger Weg 16b, DE-33100 Paderborn, Germanio)

septembro

02-03: 46-a Kongreso de Bulgara E-Asocio, Koprivštica (Bulgara E-Asocio, p.k. 66, BG-1000 Sofia)

22-24: Aŭtuna Kultura Kunveno, Waldkraiburg, Germanio (Bavara E-Ligo, Waterloostrasse 21, DE-8900 Augsburg)

24-27: 21-a Internacia Foiro de E-Turismo, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10,

PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando; tel. +48/52/415-744)

- 24 sept. - 05 majo: **Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo**, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, p/a Monda Turismo; studado senĉeesta, kun kvar semajnoj da ĉeestaj ekzamen-sesioj)

oktobro

- 02-09: **Kvina Esperanta kaj Politika Semajno**, Komańcza, Pollando (Eŭropa Federacio, Wojciech Soczówka, Rathausstr. 92 (Mariendorf), DE-12105 Berlin, Germanio; tel./faks. +49/30/706-17-23)
- 06-08: **39-a Jarkunveno de Germana E-ista Fervojista Asocio**, Zwickau, Germanio (Hans-Jürgen Riehn, Richard-Dehmel-Str. 3, DE-67061 Ludwigshafen)
- 06-08: **Rusa Kongreso**, Tjumen, Rusio (p.k. 67, RU-620077 Jekaterinburg-77; tel. +7/3432/221-074; faks. 518-647 "Esperanto 224501"; retroŝto hrgo@sbank.e-burg.su; temo: "Esperanto kaj socio")
- 12-15: **27-a Kataluna Kongreso**, Mataró, Katalunio (Kataluna E-Asocio, Apartat 290, ES-08280 Sabadell, Katalunio, Hispanio; temo: "De kompreniĝo al toleremo")
- 13-15: **82-a Japania Esperanto-Kongreso**, Jokohamo (Jokohama E-Rondo, Saido 1-18-14, Koonan-ku, Yokohama-si 233; tel./faks. +81/45/785-54-58; retroŝto cxj03014@niftyserve.or.jp; temo: "Ni vojaĝu al la nova epoko")
- 13-15: **9-a Nordorienta E-Renkontiĝo**, Muritiba, Brazilo (Manoel Borges dos Santos, Rua Dr. Zamenhof 70, BR-44340-000 Muritiba - BA)
- 20-22: **Gaja e-ista semajnfino**, As Vigo, Danlando (Lizzie Egholm, Vindingsvej 5, Stensballe, DK-8700 Horsens)
- 21-22: **Esperanta aŭtuno**, unua parto, Vieno, Aŭstrio (Internacia E-Muzeo, AT-1010 Wien-1; prelegas Ed Borsboom kaj Herbert Mayer pri Ivan Ŝirajev)
- 23 okt. - 19 dec.: **Oksemajna kurso por progresantoj**, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Folkhögskola, Lars Forsman, Fako 192, SE-691 24 Karlskoga; tel. +46/568/50-360; faks. 37-077)
- 24-03: **Kvinpetala aŭtuno**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, FR-86410 Bouresse, Francio; tel. +33/49-42-80-74; plurnivela kurso lingvaj kaj literaturaj kun Suzanne Bourrot kaj Georges Lagrange)
- 27-29: **Esperanto-tagoj '95 kaj Renkontiĝo de anoj de Bahaa E-Ligo**, Hildesheim,

Germanio (Dorothee Faridani, Bergfeldstr. 31, DE-31199 Diekholzen; tel. +49/5121/261-771)

- 28-29: **Esperanta aŭtuno**, dua parto (vd. 21-22 okt.), Bratislavo, Slovakio (Slovakia E-Asocio, Račianska 80, SK-831 02 Bratislava; temo: "Strategiaj problemoj de la E-movado")
- 28-29: **27-a Korea Kongreso de E-o**, Iri, Koreio (Korea E-Asocio, CPO Kesto 4258, KR-100-642 Seulo; tel.: +82/2/614-57-84, fakso: 614-57-85; retroŝto: keast@soback.kornet.nm.kr)
- 28-31: **4-a Mediteranea Konferenco de Esperantologio**, Triesto, Italio (Kongresfako de LF-koop, PF. 117, HU-1581 Budapeŝt, Hungario; temo: "La Esperanta leksikografio: problemoj terminologiaj kaj frazeologiaj")

novembro

- 04-05: **54-a Hispana Kongreso kaj**
- 04-11: **3-a Internacia Ĉemara Kultura kaj Turisma E-Semajno**, Salou, Katalunio, Hispanio (Kultura sekcio de Hispana E-Muzeo, pk 15027, ES-08080 Barcelona)
- 07-11: **Internacia Seminario "Toleremo — edukado por la paco"**, Zagreb, Kroatio (Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti duh 130, HR-41000 Zagreb)
- 08-10: **La kontribuo de la germanaj loĝantoj de Lodzo al la disvolvo de la urbo**, Łódź, Pollando (Lodza filio de Pola E-Asocio, ul. Moniuszki 5, PL-90-950 Łódź; tel./faks. +48/42/326-503)
- 11-13: **4-a Nacia Renkontiĝo de Esperanto**, Bogoto, Kolombio (Santiago Álvarez, A.A. 54-800, Santafé de Bogotá 2; tel. +57/9/248-16-90)
- 15-17: **Konferenco "Kleriĝo kaj komunikado en kaj por Eŭropo"**, Paderborn, Germanio (Sekretariejo de AIS, Kleinenberger Weg 16b, DE-33100 Paderborn)



4-a Mediteranea Konferenco de Esperantologio. 28-31 oktobro, Italio

- 17-19: **Kulturaj E-tagoj**, Poprad, Slovakio (adreso supre)
- 17-20: **Internacia Amikeca Renkontiĝo**, Maidstone, Britio (Anica Page, 37 Bullfinch Close, Riverhead, Sevenoaks, Kent, TN13 2BB; tel. +44/1732/456-916)

decembro

- 01-03: **46-a Kultura Semajnfino de Sarlanda E-Ligo**, Homburg, Germanio (Sarlanda E-Ligo, Pf. 2019, DE-66470 Zweibrücken)
- 01-03: **Sankt-Nikola Festo**, Zakopane, Pollando (Poprad, adreso supre)
- 01-05: **Kunveno de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo**, Xi'an, Ĉinio (Wang Tianyi, Xi'an E-Asocio, Xiyonglu 74hao, CN-710054 Xi'an; tel. +86/29/321-21-71; faks. 721-80-42)
- 08-10: **Antaŭkristnaska E-Renkontiĝo**, Bratislavo, Slovakio (Slovakia E-Asocio, Račianska 80, SK-831 02 Bratislava)
- 09-10: **Sesio de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI**, Zagreb, Kroatio (Prof. Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-41000 Zagreb)
- 10-15: **Zamenhofa Semajno**, Bouresse, Francio (La Kvinpetalo, FR-86410 Bouresse, Francio; tel. +33/49-42-80-74)
- 27-03: **39-a Internacia Seminario de Germana E-Junularo**, Wetzlar (Holger Boos, Kräuterweg 25, DE-51069 Köln; faks. 221-685-597; temo: "Perforto")
- 27-03: **12-a Internacia Festivalo**, Rotenburg an der Wümme, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; tel. +49/5624/8007; faks. 5624/322; por mezaĝuloj kaj junaj familioj; temo: "Naturkuracado")
- 28-02: **Kvara Afrika Kongreso de Esperanto**, ĉe Kilimanĝaro, Tanzanio (CO de UEA; temo: "Imagoj pri Afriko: Kontinento de espero aŭ de malespero?"; vd. p. 126)
- 29-30: **3-a Togolanda E-Kongreso kaj Sesio de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI**, Kpalime, Togolando (Unuiĝo Togolanda por Esperanto, B.P. 12096, Lomé; resp. Tietti-Instituto, B.P. 13169, Lomé)
- 29-04: **Bonvenigo de nova jaro en Prago**, Ĉeĥio (KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, Ĉeĥio; tel./faks. +42/2/991-21-26)
- 30-02: **Silvestra balo — Vintraj ekskursoj**, Poprad, Slovakio (Poprad, adreso supre)
- 30-02: **Transjara Kurskunveno de E-o de EPA**, Kameoka, Japanio (E-Propaganda Asocio, Ōmoto, Tenon-kyō, Kameoka-si, Kyōto-hu, 621)


1996

januaro

- 03-09: **Dua Komuna Aŭstralia Nov-Zelanda Kongreso**, Aŭklando, Nov-Zelando (Brian Fox, 634 South Titirangi Rd, Titirangi, NZ-1007 Auckland)
- 05-12: **4-a Internacia E-Lernejo**, Koreio (Ŭonbulisma E-Asocio, c/o Choe Taesok, Kwangmyong 2 dong 50-5, Kwangmyongshi Kyonggido - 423012)
- 15-27: **12-a Aŭstralia E-Somerlernejo**, Adelaide, Aŭstralio (Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA, 5069)

marto

- 07-09: **2-a Nacia Kongreso de Kuba E-Asocio**, (Kuba E-Asocio, Apartado 5120, CU-10500 La Habana)



Por sagacaj studentoj

Tradukarto. Venelin Mitev. Sofia: Bulgara Esperanto-Asocio, 1991. 114p. 21cm. 18,00 gld.

Ĝardeno de imagpovo

Familio Talhe. *Ŝedrvanĝardeno* (1972). Irfan Horozović (1947). El la serbokroata trad. Vesna Skaljer-Race. Sarajevo-Banjaluka: ELBiH, 1991. 116p. 22cm. 33,00 gld.

Jen tre originala kroniko: sen datoj, sen strikta sekvo de eventoj, sen streboj dividi la realon disde imago-povo, sed kun multaj detaloj, kiuj kaptas la atenton de la rakontanto kiel gvidmotivoj de la homaj sortoj. En la bosnia drapkomercista familio Talhe okazas diversaj nekutimaĵoj: sekvado de arĝenta petrollampo, obsedo je sfinksoj, deziro bilde ĵugi rajdiston kun levita lanco, neeblo morti.

La titola *Ŝedrvanĝardeno* estas laŭdifine stranga loko: al ĝi "ligiĝis sufiĉe da rakontoj fremdaj al la homa cerbo. ... Tio fakte eĉ ne estis frenezulejo en vera senco, ankaŭ ne arestejo aŭ pundo, tio estis ŝtato kun siaj leĝoj kaj reguloj pri konduto, ŝtato kiu ekzistis iel paralele, nealirebla kaj fiera, kiel estas fiero ĉio kion ni timas kaj kio al ni ŝajnas neklarigebla" (p. 42). Ĉiuj

rakontoj konstruiĝas sur tiel masonita fundamento.

Hasto estas tute fremda al ĉi tiu prozo, havanta sian longfrazan, meditan ritmon, markatan plie per evoluo de pensoj ol per sekvo de faktoj. Kelkaj eroj estas tute tradiciaj laŭ la kriterioj de realismo. Aliaj estas konstanta ĵonglado per spacaj kaj tempaj rilatoj. Ĉie tamen la frazmagio riĉe ĉerpas el la islama kulturo. Kvankam por ekstero neeviteble perdiĝas multaj signifoj, postrestas tamen en la memoro tre mistera mondo, kiun valoras viziti.

Ĝuante la tekston mi pensis pri la malfacila laboro de la tradukisto. Tiaspecan prozon Esperanto ofte rezistas, ĉar la longo de frazoj malklarigas la rilatojn inter ties eroj. Skaljer-Race sukcese respondis ĉi tiun defion.

Wojciech Usakiewicz (Pollando)

Mitev transdonas spertojn akumulitajn dum tridek jaroj da tradukado. Ne dogme predikante, ofte kun prudentaj praktikaj sugestoj, li kovras preskaŭ ĉion: fideleco kaj laŭvortismo, neeviteblaj adaptaj, metriko, ritmo, rimo, vort-muziko, stilo, neologismoj. Temas pri traduko de proverboj, blasfemoj, ebriula lingvaĵo, naciaj specialaĵoj, nomoj, slango, dialekto. Pri ĉio ekde la elekto de la verko tradukota ĝis la antaŭpresa korektado.

Krome vi trovos ĉapitrojn pri bulgara-Esperanta tradukado. Multaj ekzemploj estas en la bulgara, sed sagaca studento (kaj ĉiu tradukanto estu sagaca!) scios utiligi ankaŭ tiujn partojn, komparante la diversajn tradukojn kaj interpretante la komentojn.

Sed... kiu admonas kontroli la ortografion de personaj nomoj, tiu ankaŭ mem faru, kaj korektu *Verlain*, *Flobert*, *Hoisinha* al *Verlaine*, *Flaubert*, *Huizinga*. Sed nek tio nek la bulgaraĵoj detenu la seriozajn tradukemulojn esplori (kvankam foje kritike) ĉi tiun riĉan fonton de pripensindaĵoj!

Wouter F. Pilger (Nederlando)

Utila "maullibro" pri politiko

Deklingva manlibro pri politiko. Editoris Stefan Maul. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1994. iii+230p. 20cm. 21,00 gld.

La unua sento kiu ĉirkaŭprenis min post supraĵa trafolumo de *Deklingva manlibro pri politiko* de Stefan Maul, estis grandega admiro. Jen rezulte de okjara formika laboro de la "editoro", kiel nomis sin Maul, kaj de liaj 22 kunlaborantoj el 14 landoj, ni ricevis pioniran kompendion, kies bezono estis senteblo de longe. 1150 kapvortoj kun tradukoj en 9 lingvoj, pri politiko kaj najbaraj vivsferoj (ekonomio, socio, kulturo, ekologio kaj juro), ekzemploj de la kunteksta uzo de kapvortoj, plej gravaj derivaĵoj, indikoj kaj klarigoj pri multaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj — jen konciza prezento de la verko, kiun sendube bezonos ĉiu praktika uzanto de E-o, sed speciale ĵurnalistoj, instruistoj, studentoj, verkistoj.

Bone impresis min la trafe kaj koncize formulitaj E-lingvaj difinoj de terminoj kaj nomoj — kvankam pri kelkaj oni povas havi alian opinion. Ekz. *geopolitiko* laŭ mi estas tro mallarge difinita ("la politiko de unu ŝtato determinita de la fizikaj karakteroj de ĝia lando"); mi preferus diri, pli konkrete, "politika doktrino kreiginta lime de la 19-a kaj 20-a jarcentoj, kiu premisas ke la geografia situo determinas la direkton de evoluo kaj ekspansio de iu ŝtato. Ĉi tiun doktrinon lanĉis ŝtatoj fortaj (ekz. Soveta Unio aŭ la hitlera Tria Regno), kvazaŭ dezirante pravigi sian agresemon kaj ekspansieron per la naturaj evoluokondiĉoj de la socio, determinitaj de la geografia medio".

Manlibro pri politiko prefere estas *Leksikono de sociopolitikaj terminoj* — sed tio ja neniel estas kritika. Dum ni havas amason da nacilingvaj enciklopedioj pri politiko, ĝuste en Esperanto ni bezonas ampleksan kaj laŭeble aktualan politik-teman leksikonon. En la *Manlibro* estas ĝuste aparte rimarkinda la aktualeco de la terminoj, ekz. *perestrojko* kaj *glasnosto*, *holdingo*, *misilo*. Aliflanke mankas diversaj terminoj kiuj ja funkcias ne nur en la politika, sed ankaŭ en la esperantista vivo (dum komitatkunsidoj de UEA), kiel *ĝenerala konsento* aŭ *ombudsmano* (pledanto por rajtoj de civitano).

Per aldono de alfabetaj indeksoj la verko fariĝus pli vaste uzebla. Sed tio estas bagatelaĵo kompare kun la ĝenerale ege bona *Manlibro* kiun ni ricevis. La subskribinto, profesia kaj ĉiutaga uzanto de politikaj terminoj de 36 jaroj, varmkore rekomendas la libron al ĉiuj.

Andrzej Pettyn (Pollando)

Vivo kiel persekuto, persekuto kiel vivo

Buŝo plena je tero. Branimir Ŝćepanović. El la serba trad. Antonije Sekelj. Beograd: T. Kapista, 1994. 108p. 18cm. 17,40 gld.

Montenegro estas, ŝajne, tiu angulo de Eŭropo kiun la cetera mondo plej forgesis. Eĉ nun, kiam la sangaj eventoj en eksa Jugoslavio timfrostigas homojn en aliaj landoj, la nomo "Montenegro" apenaŭ aŭdeblas. Ĉu tio signifas ke la landeto estas tiom provinceca kaj neglektebla? Ĉu nenion valoran oni atendu de tie?

Krom historia epopeo de la pasint-jarcenta montenegra princo-episkopo P. P. Petrović, *La montara krono*, la moderna kulturo de la malgranda lando restis ĝis nun "blanka makulo" en Esperantujo. Nun tamen unu perlo de ĝia moderna literaturo, eldonita jam en 24 lingvoj, atingis Esperantan internaciecon.

Buŝo plena je tero estas granda novelo aŭ tre malgranda romano, parolanta en samtempe realisma kaj simbola stilo pri la esenco de rilatoj inter homoj. Homo, kondamnita de la sorto kaj kuracistoj al morto, volas adiaŭi la vivon propramane, ne atendante

la "nature" turmentan finon; li fuĝas por tio el urbo al Naturo, kie li sentas siajn radikojn. Li kuras... Sed jen la afero: aliaj, kiuj vidas lin kuranta, subite komencas lin postkuri! Ekfunkcias iu antikva instinkto de persekuto. La persekutantoj provas klarigi racie sian konduton; jen iu kvazaŭ deziras helpi, jen alia kvazaŭ rekonas en la kuranto sian malamikon, jen... Ne gravas, volas montri la aŭtoro, ja funkcias baza instinkto de interhomaj rilatoj — se iu kuras, eĉ se de si mem, eĉ se al la propra morto, oni devas lin persekuti, kaj la racio superfluas.

Kaj jen la neevitebla sekvo: kiam la persekutata viktimo ekkonscias la neeviteblon de la persekuto, tio renaskas en li la volon al la vivo. Anstataŭ soleca morto li nun serĉas savon — kaj trovas. Ne gravas en kiu formo. Tiel, retrovinte — kun la volo al la vivo — sin mem, li superas siajn ĉiam pli multnombrajn persekutantojn, venkas ilin. Aperas la demando: ĉu tiu praa, mal-

Socio kaj Esperanto

La Fondaĵo Socio kaj Esperanto, fondita en Sofio en 1993, alvokas membriĝojn kaj subtenojn. La fondaĵo celas diversmaniere sproni la Esperantan kulturon en Bulgario kaj popularigi la bulgaran kulturon en E-o. Unu el ĝiaj plej ambiciaj celoj estas eldono, en 1997, de *Bulgara Enciklopedio "Esperanto"*, kiu prezentos la internacian kaj la bulgaran E-movadon. Pretas jam 1200 artikoloj por la verko. Ĉiu donacinto de min. 50 dolaroj rajtos je propra artikolo kun foto. Informoj: Fondaĵo "Socio kaj Esperanto", Canko Ignev, str. Haĝi Dimitar 17, BG-1000 Sofia, Bulgario; tel.: +359/2/881-339.

supera instinkto de persekuto estas nur indiko de la negativa homa naturo aŭ ankaŭ io sava, revigiga? Ĉiu respondu laŭ sia kompreno.

La traduko bonege transdonas la densan, streĉan modernan prozon. La esence filozofia romaneto legiĝas legere, kun ĉiam kreskanta intereso — al kio kontribuas la bela aranĝo de la libro.

Nikolao Gudskov (Rusio)

Bonvolemo ne sufiĉas

El la makedona:

Blankaj aŭroroj. Koĉo Racin. Trad. Nikola Rašić. 1993. 39p. 4,80 gld.

Blankaj mamoj de Bosilka. Gane Todorovski. Trad. Vera Ĉornij. 1992. 60p. 5,40 gld.

Eterna domo. Petre M. Andreevski. Trad. Nevenka Tomić. 1992. 46p. 5,10 gld.

Kastelo de la rozo. Radovan Pavlovski. Trad. N. Tomić. 1991. 42p. 5,10 gld.

Nevidebla rivero. Todor Ĉalovski. Trad. N. Tomić. 1991. 56p. 5,10 gld.

Nokto de parolo. Petre Bakevski. Trad. N. Tomić. 1993. 63p. 5,40 gld.

Raviĝoj. Eftim Kletnikov. Trad. Tatjana Ropajkova. 1993. 64p. 5,40 gld.

Tagmeza sonĝo. Branko Cvetkoski. Trad. N. Tomić. 1993. 55p. 5,10 gld.

Ĉiuj: Skopje: Makedona E-Ligo. 20cm.

De pluraj jaroj aperis diversaj tradukoj el la makedona lingvo, ĝis tia nombro ke eĉ grandaj Esperantomovadoj povus ĵaluzi. Tio des pli gratulindas se ni scias ke la belega kaj vizitinda makedona ŝtato suferas gravan ekonomian krizon, kaj dankindas pro la ĝenerala manko de elmakedonigoj en multaj lingvoj.

Bedaŭrinde sindonemo kaj patrujamo de tradukemulo ne sufiĉas por krei artan verkon. Leganto eksentas nenium plezuron ĉe lingvaĵo kvazaŭ de komencanto, plena de elementaj gramatikaj eraroj, adasismoza kaj verkita per vortoj plataj, senelvokaj, ĉiutagaj. Bedaŭrinde, ĉar pluraj aŭtoroj meritas diskonigon.

Meze de tiu malĝoja panoramo elstaras raraĵo: *Raviĝoj* ravas en traduko de Tatjana Ropajkova, tre supera al ĉiuj aliaj.

Hektor Alos i Font (Katalunio)



Kargon al ĉies haveno

En la pasinta jaro la esperantista eldonisto Jean-Claude Bernard lanĉis, per la eldono de *Vivi sur barko* de Eugène de Zilah, la serion *Kargo* de beletraj, belaspektaj, bonkvalitaj libroj.

Antaŭ kelka tempo István Ertl per privata cirkulero turnis sin al mezgranda nombro da samideanoj, informante ilin pri ĉi tiu iniciato. Li sciigis ke aliaj verkoj jam atendas eldonon. Tamen, la propraj rimedoj de la eldonisto ne sufiĉas por sufiĉe rapide efektiviĝi ĉion tion. Tial Ertl alvokis tiujn por kiuj gravas la kulturo de Esperanto kaj kiuj ne estas tute sen financaj rimedoj, fariĝi abonantoj-apogantoj de *Kargo*.

Tiucele oni povas, pagante minimume 50 gld. en la konton "karg-x" ĉe UEA, aĉeti kiujn ajn el la libroj eldonotaj en tiu serio, kun 25%-a rabato, ne bezonante pagi sendokostojn. Min. 75 gld. krome rajtigas mendi la jam aperintan *Vivi sur barko* samkondiĉe. Abono je 100 gld. donas pluan avantaĝon.

Mi trovas la iniciaton de s-ano Ertl vere tre simpatia kaj laŭdinda, sed ne vere sufiĉa. Supozeble multaj inter tiuj kiuj havas varman koron por

Esperanto kaj ĝia literaturo kaj krome kapablas finance subteni amatan aferon, havas jam plenan libroŝrankon kaj/aŭ sufiĉe grandan aĝon, kaj tial ne sentas urĝan bezonon aĉeti novajn verkojn. Aliflanke estas samideanoj kun koro ne malpli favora por Esperanto sed ne povantaj pagi por libroj en Esperanto. Tiaj grandnombre troviĝas en tiu pli granda parto de la mondo kiu de la riĉa "okcidenta" mondo estas ekspluatata.

Tial ni montru iom da solidaro, subtenu samtempe du subtenindajn celojn: eldonon de E-literaturaĵoj unu parte, kaj, aliparte, havigon de tiaj libroj al esperantistaj individuoj, kluboj kaj organizaĵoj kiuj mem ne havas la rimedojn por aĉeti tiajn verkojn. Certe estus eble rekomendi adoptindulon al tiuj kiuj serĉas adoptoton. Mi jam decidis pri la miaj: samideano en Afriko kaj E-klubo en orient-eŭropa ĝemelurbo. La elekton pri la libroj kompreneble ili mem faru.



J-C. Bernard kaj lia unua Esperanta eldonaĵo

Cetere, tiuj kiuj ja por si mem aĉetas, nepre ne sentu sin iel "devigitaj" ne krome adopti iun.

Por via informo: ĉi-temaĵojn sendu al István Ertl, Deensestraat 44B, NL-3028 GK, Rotterdam, Nederlando.

Bonhavuloj, ne avaru!

Petro Rulofido (Nederlando)

La simpleco de elstaruloj

Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius. Vol. 1. Red. Paul Neergaard kaj Christer Kiselman. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1992. 11+118p. 26cm. 12,90 gld.

La prospera perspektivo de Esperanto estas bazita sur la vasta uzado. Oni devas fari ĉiujn eblojn por ĝia uzado en scienco kaj tekniko, krom en politiko, literaturo kaj turismo." Tiuj ĉi antaŭparolaj vortoj de la prezidanto de la Ĉina akademio de Sciencoj, Zhou Guangzhao, tre bone priskribas la sencon de la libro kaj de la klopodoj de Internacia Scienca Akademio Comenius.

Ĉi tiu volumo unua (de espereble longa vico) prezentas dek kvin artikolojn en du partoj: la humanisma kaj la matematika-naturscienca.

Persone mi povis legi kaj taksi nur la artikolojn de la unua parto — kaj ankaŭ tiujn nur kiel laiko. Ili ĉiuj estas interesaj ne nur por fakuloj, sed ĝenerale por homoj kun scivolemo pri kulturaĵoj. La aŭtoroj verkas en stilo tre simpla pri temoj tre komplikaj. Tio

estas unu el la markoj per kiuj oni rekonas elstarulojn. Kaj elstaraj ili ĉiuj estas: Nisbet, Lapenna, Régulo Pérez, Bociort, Waringhien, Pennacchietti kaj Migliorini. Mi detenas min de komentoj pri la matematikaj-natur-

sciencaj artikoloj. Por doni ideon pri la enhavo mi nur citas du titolojn: "La teoremo de Siu por abstraktaj nombroj de Lelong" (Kiselman) kaj "Tuj Markov-aj procezoj kaj iliaj infinitzimaj generantoj en vasta senco" (Okada kaj Okada).

Konklude, temas pri libro en kiu ĉiu povas trovi multon. Gratulojn al Akademio Comenius kaj al Ĉina Esperanto-Eldonejo!

Renato Corsetti (Italio)

"Carson" elĉerpiĝos post du jaroj


Dum dek unu jaroj, Eduka Fondaĵo Carson el Kanado distribuis pli ol 60 000 kanadajn dolarojn por subteni edukajn projektojn en multaj landoj.

Nun la direktoroj decidis elĉerpi la tutan sumon de la Fondaĵo dum la venontaj du jaroj. Ili kuraĝigas esperantistojn kun bone elpensitaj proponoj *skribi por petformularo* al: Eduka Fondaĵo Carson, 1339 Hamilton St. N.W., Calgary, Alberta, Kanado T2N 3W8.

La Fondaĵo jam subtenis lernolibrojn, vortarojn, korespondajn kursojn, stipendiojn por ĉeesti kursojn, instruvojaĝojn, varbobroŝurojn kaj la vidbendan kurson Mazi. Lastatempaj projektoj subvenciitaj inkluzivas eldonon de Esperanto-rokmuzika kompaktdisko (dua volumo), novajn lernolibrojn por german- kaj por sinhal-lingvanoj, kaj kursojn en pluraj landoj de Centra Ameriko.

Anne Neave, kuratoro

Laste aperis




Foliume

Comprehensive English-Esperanto dictionary. Peter Benson (1940). El Cerrito: ELNA, 1995. 607p. ISBN 0-939785-03-X. 22cm. La plej ampleksa kaj ĝisdata vortaro angla-Esperanta, kun ĉ. 28 000 kapvortoj. 39,00 gld.

Diċtionar esperanto-român. Ignat F. Bociort, Ana Bruțiu k.a. Timișoara: Eurobit, 1995. 276p. ISBN 973-9201-04-0. 27cm. La unua granda Esperanto-romana vortaro, kun ĉ. 10 000 kapvortoj. 18,00 gld.

Esperanto-Wörterbuch. Ulrich Matthias (1966). Neckarhausen: E-Jugend Heidelberg, 1995. 45p. 21cm. Bazaj gramatiko kaj vortaro por germanlingvanoj. 3,30 gld.

Hungaraj skizoj. Ungarische Skizzen. Magyar vázlatok. Franz-Georg Rössler (1949). Dudenhofen: Ponto, 1995. 63p. ISBN 3-9803793-3-7. 21cm. Ilustraĵoj de Rita Rössler-Buckel. Trilingva: germana-Esp.-hungara. Hungariaj vojaĝ-spertoj. 16,80 gld.



Imperio Ornaks, La. A. Thorkent. Trad. Liven Dek. Santander: Grupo Nifo, 1995. 96p. ISBN 84-605-2457-4. 17cm. Serio Future. Sciencfikcia romaneto: aventuristo dungigas por senmaskigi roboton rolantan kiel imperiestro. 9,00 gld.

Invit' al Ĉinesko. Lu Jixin (1953). Breda: VoKo, 1995. 28p. 21cm. "Defio al bonaj Esperantaj poetoj": poemoj verkitaĵ laŭ la ritmoj de la klasika ĉina "Ci-o". 4,80 gld.

Lingvaj respondoj. L.L. Zamenhof. Editoris Gaston Waringhien. Vieno: Pro Esperanto, 1995. 10+130p. ISBN 3-85182-031-2. 24cm. Represo de la sesa eldono el 1962. 24,00 gld.

Lingva orientado per Esperanto en la unua-grada lernejo. Gvidlibro por instruistoj. Elisabetta Vilisics Formaggio (1934). Roma: E.R.A., 1995. 79p. 21cm. Dulingva: E-itala. 16,50 gld.

Ludu kun ni! Propedeŭtika lingvokurso por infanoj. Elisabetta Vilisics Formaggio (1934). Roma: E.R.A., 1994. 150p. 30cm. 33,00 gld.

Orbito nula 1. Div. aŭtoroj. Trad. K. Ungar, L. Dek, I. Oneț k.a. Santander: Grupo Nifo, 1994. 139p. ISBN 84-605-3116-3. 17cm. Dek tri noveloj de famaj sciencfikciaj aŭtoroj. Unua ero de nova serio. 12,00 gld.

Remember and Forget. Short Stories from the Northern Mountains. Trevor Steele (1940). El Esperanto trad. la aŭtoro. Vienna: Pro Esperanto, 1995. 123p. ISBN 3-85182-027-4. 23cm. Angligo de *Memories of the Northern Mountains* de Trevor Steele. 24,00 gld.

Servisto de l' ideo. 50 jaroj ĉe Universala Esperanto-Asocio — 1908-1958. Hans Jakob (1891-1967). Editoris Mark Fettes. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1995. 120p. ISBN 90-71205-58-4. 21cm. Rememoroj de "la plej longdaŭra el ĉiuj oficistoj de UEA", kiun konis ĉiuj kaj kiu konis ĉiujn. 33,00 gld.

Streĉitaj koroj. Gerrit Berveling (1944). Breda: VoKo, 1995. 80p. 21cm. Tria parto de aŭtobiografio: la vivo de nederlanda esperantisto inter 1975 kaj 1980. 10,80 gld.

Unuminutaj noveloj (1968). István Örkény (1912-1979). Red. István Ertl. El la hungara trad. Vilmos Benczik, Lajos Tárkony k.a. Berkeley: Bero, 1995. 120p. ISBN 1-882251-06-7. 21cm. Tre mallongaj prozaĵoj kun "minimumo da informoj", postulantaj de la leganto "maksimumon da imagoj" (laŭ la verkinto). 14,70 gld.

DIVERSAĴOJ

Poŝtkartoj "Pri la kultura historio de la Esperanta movado". Dortmund/Lyon/Oberkirch: Fritz-Hüser Instituto/Monda Kunagado/Libera E-Asocio, 1995. 8 pecoj. 9,90 gld.

Vidbendoj: Fontanoj de Romo de la 16-a ĝis la 20-a jarcento. Roma: Bivision, 1995. VHS-PAL. 72 min. 45,00 gld. Dublita en Esperanton. **Kreski kun Esperanto. Spertoj de REF-idoj.** K. Tišljár, A. Jagnjić. Zagrebo: UEA/Rondo Familia, 1995. VHS-PAL. 39 min. Pri denaska edukado de e-istoj. Infanoj rakontas siajn travivaĵojn dum Renkontiĝoj de E-istaj Familioj. 36,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Verbe kaj varbe

Temoj de la junulara revuo *Juna amiko* verbas jene: 95/2, *mangi kaj trinki ... kion?*; 95/3, *instrui kaj lerni ... kion, kial, kaj kiel?*; 95/4, *Kion ŝangi, kion konservi?*. La redaktoro invitas proponojn por la kvar verbaj temoj de 1996. Por tiu jaro la abonprezo devos altiĝi 10-20%. Tamen, pagitaj mendoj por 1996 estas akceptotaj ĝis la 30-a de sept. 1995 laŭ la nunaj tarifoj. Speciala oferto: abonu 6 numerojn (95/3-96/4) por 1.5-oblo de la nuna 4-numera prezo. (S. McGill)

Aĉeteblaj en ekstermovadaj librovendejoj

En germanaj librovendejoj aperis dudirekta E-vortaro: Langenscheidt kunigis en unu volumo (*Kompakt-wörterbuch Esperanto*, 472 p.) la du konatajn poŝvortarojn de Erich-Dieter Krause. (U. Matthias)

Ankaŭ en Pollando tutlande haveblas esperantaĵo: la eldonejo Lingua lanĉis koncizan lernolibron por poloj, prezentotan en ĉiuj polaj librofoiroj. (W. Brzeziński)

Verkistoj voĉlegu

Nora Moerbeek, sekretariino de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, ricevis por LIBE pakajon el Aŭstralio: *Aventuroj en Esperantujo* de Ralph Harry sur ok kasedoj, voĉlegitajn de la aŭtoro. Moerbeek alvokas aliajn verkistojn sekvi la ekzemplon de Harry — kaj de Spomenka Štimec, kies *Kroata milita noktlibro* aperis sur tri kasedoj per la voĉo de la aŭtorino, laŭ mendo de Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj.

Interreĝa IPR

Dum "interreĝa periodo" post Márta Kovács kaj antaŭ József Németh, redaktoroj de *Internacia Pedagogia Revuo*, Stefan MacGill plenigis numeron (94/4) per recenzoj pri lastatempaj E-lerniloj. La speciala numero aĉeteblas ankaŭ aparte ĉe ILEI (5 gld. al la UEA-konto "ilek-a").

Reagoj



Auschwitz-mensogo

Vi citas el akra reaga letero de R. Haupenthal al la svisa ĵurnalo *Neue Zürcher Zeitung* (apr., p. 70): “La aserto ... ke Esperanto ne havas etoson kaj profundon, estas lingvistika Auschwitz-mensogo; temas ja pri misfamigo de lingvo (la unua ŝtupo al lingvomortigo) kaj de internacia (ankaŭ denaska) lingvokomunumo.”

Povas esti ke la artikolo en la svisa ĵurnalo estis polemika, eble malbôncela, eble ĝia aŭtoro eĉ plenas de malamo kontraŭ planlingvoj. Sed la cititaj linioj de Haupenthal estas kaj logike kaj morale neelteneblaj, kaj mi tre miras ke revuo kiel *Esperanto* aŭdacas publikigi ilin.

Logike: La “Auschwitz-mensogo” konsistas esence en la neo de la fakto ke en naziaj koncentroj homoj amase kaj sistemece estis murditaj, ke entute ekzistis iuj planoj ekstermi ekz. judojn. La skribinto en NZZ opinias Esperanton “malbono”, kiun “oni devas deklari morta”: do, li partoprenas ja en la misfamigo de lingvo kaj ĝia komunumo, kaŭzas damaĝojn, sed ne neas ies ajn morton.

Almenaŭ tiamaniere la vorto “Auschwitz-mensogo” hodiaŭ estas ofte uzata. Eĉ pli harstariga fariĝas la citaĵo de Haupenthal, se oni konsideras la originon de la vorto: ĝi aperis unue en la lingvaĵo de la novnazioj, kiuj deklaris la historiajn faktojn “mensogo”. La novnazioj kulpigis historiistojn mensoguloj, Haupenthal kulpigis la aŭtoron mensogulo. Kiu estas komparebla kun kiu en tiu sinistra vortludado?

Morale Haupenthal evidente celis alian komparon: tiun kun la nazioj murdintaj judojn, polojn, rusojn, ĉeĥojn ktp. Ankaŭ mi kelkfoje ŝatas troigi por klarigi al eternaj nekredemuloj mian vidpunkton pri io, sed mi neniam ĵonglus kun la morto de miloj da homoj en la naziaj koncentroj, uzante ilin por komparo kun tiom “bagatela” afero: la “etosoj kaj profundo” de E-o. Kiu estonte kredos nin, se ni publikigas tiajn absurdaĵojn?

Ulrich Becker (Germanio)

Malpli valoraj?

Zamenhof mem ne plezure legus pri “malpli valoraj personoj” en artikolo de A. Korĵenkov (marto, p. 44): “Iom post iom ... Esperanto fariĝas ĉiam pli margena kaj malgrava okupo, al kiu sin dediĉas ĉiam malpli multaj kaj *malpli valoraj personoj*.”

Jes, valoraj personoj estas Kalocsay, Waringhien, Auld, Boulton, Selten k.m.a. Sed en miaj okuloj valoras ne nur generaloj, admiraloj kaj aliaj altranguloj en armeo. Ĉu generaloj sole sufiĉas por venki en batalo? Ĉu simpla infanteriano ne havas sian rolon? Por mi estas valora, eĉ tre valora, tiu maljuna samideano kiu gastigis mian edzon en najbara lando, kien li iris por medicina esploro ... Mi ne nomus “malpli valora” eĉ unu fidelan, modestan esperantiston.

Lenke Szász (Rumanio)

Malpli fidelaj

Bone mi memoras miajn perleterajn kontaktojn kun samideano Dmitrij Cibulevskij (Ukrainio) kaj nun tute konsentas pri lia artikolo (apr., p. 52).

En la “nigraj GDR-jaroj” mi, negermano, sufiĉe regule korespondis kun gesamideanoj el la “oriento”. Tamen, post la falo de la Berlina Muro ne plu venis respondoj. Poste mi legis kaj, de “pli fidelaj” gesamideanoj, aŭdis: “jes, bedaŭrinde post la ŝanĝoj por iuj Esperanto ne plu gravas por havi eksterlandajn kontaktojn”.

Kompreneble, estas en “Esperantujo” homgrupoj kiuj ne facile povas integriĝi en la socion, sed aliflanke ekzistas pluraj helporganizajoj kiuj meritas nian atenton; ĉefa afero estas trovi la ĝustajn personojn je la ĝustaj lokoj.

Constant Borremans (Germanio)

Malpli fidindaj

Kun bedaŭrego legis mi pri trompantoj el Niĝerio (jan., p. 8).

La registaro niĝeria klopodas kontraŭbatali trompadon en la lando. Trompantoj plej ofte promesas vendi

varojn tute malmultekoste, montrante pruvilojn ke ili estas perantoj de kompanio. Sed fine, preninte monsumon, ili ĉiam foriras!

Tamen, unuafoje mi aŭdas pri la tromp-metodo priskribita de H. Bakker: eĉ ne temas pri promeso vendi ion ajn! En tian kaptilon falas nur dubindaj kaj troprofitemaj personoj, ĉar kiu alia konsentus sendi sian kontonumeron al persono konata nur koresponde? En Niĝerio trompitoj estas dubindaj, kaj la policianoj normale arestas ankaŭ ilin.

Plej bedaŭrinde estas ke “iuj e-istoj en Niĝerio okupiĝas pri simila trompado”. La E-movado estas ankoraŭ tiel malforta en Niĝerio ke ni ne toleru ion ajn kio minacas ĝian kreskon.

ŬSHŬ-DAVIES Olúwàbùnmí (Niĝerio)

Pri lingvo

De Diego agacas

Tre incitis min legi en la intervjuo de F. de Diego (apr., p. 61) la *dufoje* esprimatajn malicajn kritikaĵojn kontraŭ la franca-Esperanta vortaro de J. Le Puil kaj J.-P. Danvy! Ĝi tute ne “desaĉpontos” min, male mi trovas ĝin tre utiliginda.

Eble estos pli valora la hispana-Esperanta de tiu malmolestulo, kiu “orgojlas, kvazaŭ li estus naskita el la femuro de Jupitero” (Le Puil-Danvy, p. 240) kaj kies verkojn mi tute ne intencas legi! Vere, kelkaj movadaj “eminentuloj” profunde *agacas* min kaj mi *ne* konsideras ilin samideanoj!

Julien Ducrocq (Francio)

Longeco ne esencas

F. de Diego ilustras la propran karakteron de la vortfarada sistemo de Esperanto per tre longaj kunmetaĵoj. Ja, neniu strikta regulo malpermesas fari kunmetaĵojn tre longajn, kaj en specialaj kazoj povas esti motivoj por fari tion (ekz. por traduki la 80-silaban nomon de iu festmanĝaĵo en la komedio *Popolasembleantinoj* de Aristofano). Tamen, la plej esenca trajto de nia vortfarada sistemo estas io alia: tio ke Esperanto konsistas el senŝanĝaj morfemoj kun fiksataj signifoj, libere kombineblaj al vortoj, se la kunmetaĵo nur havas sencon. Eblas diri: en Esperanto oni povas trakti la morfemojn kiel sintaksajn unuojn. Kaj same kiel trakti vortojn kiel sintaksajn unuojn ne implicas fari longajn frazojn, ankaŭ

trakti morfemojn kiel sintaksajn unuojn ne implicas fari longajn kunmetaĵojn.

Willem Verloren van Themaat
(Nederlando)

Ŝtopita defluilo

Mi sentas gravan mankon ĉe la surstrata enketo pri lingvokono en Germanio (marto, p. 42): oni neniel provis difini nivelon kaj tipon de lingvorego. Ni ja ne tre interesiĝas pri kliŝa komerca korespondado, sed pri libera, egalvaloreca interhoma komunikado.

Antaŭ ok jaroj mi faris, ofice, malgrandan telefonan enketon pri lingvokono kaj -rego en Nederlando, kun nur 100 demanditoj. Tie ni aldonis kelkajn test-frazojn por iel ekhavi indikon pri la *nivelo* de la lingvorego. Post klarigo ke temas pri plendo en hotelo, la frazon "La defluilo de tiu

lavkuvo jam estis ŝtopita kiam ni ekloĝis en ĉi tiu ĉambro" *neniu* povis ("senhezite kun certeco", laŭ niaj kriterioj) esprimi angle aŭ germane. Unu povis diri ĝin en la franca, kaj unu en Esperanto (el la du kiuj diris ke ili konas Esperanton). Kompreneble ankaŭ el ĉi tiu enketo ne eblas tiri konkludojn pri la nombro de la E-parolantoj. Sed jes ja pri la neceso esplori pri la nivelo de la memstara uzo de lernita fremda lingvo.

Wouter F. Pilger (Nederlando)

Finlando jes — Bharato ne!

Mi esperas ke multaj subtenas la proponon de Ian Fantom "meti finon al la absurda literumo" *Finnlando* (apr., p. 69). Ke oni prononcas [finlando] estas sendube, kaj se oni insistas enmeti plian *n*, oni senintence kreas plian silabon, nepermeseblan. Mi neniam komprenis kial oni ne universale

aplikas la formojn *Finland-o*, -a, -ano, paralele al *Irland-o*, -a, -ano.

Iom similas la kazo de *Bharato*, nomo kiun hindoj tre ŝatas por sia lando. Laŭ ili, *bh* reprezentas specialan sonon en iuj hindaj lingvoj, sed tian regulon oni certe ne povas apliki en la kreado de landonomoj (aŭ aliaj vortoj) en Esperanto! Se jes, kial ne *theatro*, ĉar *th* indikas specialan sonon en la greka kaj angla lingvoj? Oni povus eventuale konsideri *Barato*, sed aldonado de *h* post *b* aldonas silabon neeblan en Esperanto.

Johano Rapley (Britio)

Bhnnno

Mi volas enkonduki neologismon, por "vorto neprononcebla en Esperanto". Ĝi estas *bhnnno*. Tiuj kiuj ŝatas tiajn formojn, eble povos instrui al mi kiel prononci ĝin.

Ian Fantom (Britio)

Belgio: Familia klubejo

Dank' al la familio Lödör, la E-klubo en Gento nun disponas pri propra ejo. Dum tuta jaro familianoj, e-istoj kaj konstru-entreprenistoj laboris por inaŭguri kiel klubejon, la 24-an de februaro, la antaŭan loĝejon de Árpád Lödör. (*Vertikale*)

Brazilo: Salutu Info-Esp


Meze de aŭgusto okazos en la brazila ĉefurbo ekspozicio, kie oni lanĉos la komputil-disketon *Info-Esp*, kun ĉiuj informoj pri Esperanto, kun aŭtomata serĉvortaro kaj parola Esperanto-kurso. La kunordiganto, Roberto Resende, petas ke oni sendu salut-kartojn ekspoziciotajn al: E-ekspozicio, C.P. 9831, BR-70001-970 Brasília (DF), Brazilo.

Michel Abdo Alaby, direktoro de Asocio de Brazilaj Entreprenoj por la Integriĝo en Sudmerkaton [komuna merkato de kvar sud-amerikaj ŝtatoj], akceptis estraranon de San-Paŭla E-Asocio, José Calixto Gaido. Alaby promesis helpi se e-istoj eventuale farus paŝojn por enkonduki Esperanton kiel trian laborlingvon de Sudmerkato (apud la hispana kaj la portugala). (*Brazila Heroldo*)

Bulgario: Lapenna en traduko

Nikola Stranganski tradukis kaj eldonis en Burgas (1994, 144 p.) bazan verkon de la Esperanta kulturo, *Retoriko* de Ivo Lapenna. (*Bulgara E-isto*)

Loke



Aŭstrio: Reklamo per tramo

La 18-an de junio 25 e-istoj veturadis dum tri horoj tra Vieno per malnova tramvagono kun ambaŭflankaj ŝildoj "Esperanto!", kiun luprenis E-Laborkomitato Aŭstria. Ĉe la haltoj la pasaĝeroj disdonis flugfoliojn. La tuta varbagado kostis ĉ. 1500 gld. (K. Fetes-Tosegi, W. Klag)

Kadre de fortiĝanta kunlaboro inter Slovakio kaj Aŭstrio, la jam tradicia Esperanta Printempo ĉi-jare okazis du parte: en Bratislavo kaj Vieno (18-19 resp. 25-26 marto). Po kvindeko da partoprenantoj aŭdis prelegojn de Vilmos Benczik, Stanislav Košecký kaj Herbert Mayer. (*La Dua Jarcento*)


Germanio: 26-jara prezidanto

En la Pariza jarkunveno Germana E-Asocio elektis novan prezidanton: Frank Stocker estas 26-jara studento pri politikologio kaj slavistiko en Heidelberg. En 1992-1995 li redaktis la germanlingvan eldonon de la GEA-organo, *Esperanto aktuell*. Li verkas magistran laboraĵon pri la lingvo-politiko de Eŭropa Unio. (U. Matthias)

En GEA oficas ekde januaro 1995 pagata afergvidantino, Ursula Niesert, kies dungo provizore daŭras unu jaron. (*Esperanto aktuell*)

Italio: Rekorda IJF

La 19-a Internacia Junulara Festivalo en Marina di Massa (12-18 apr.) rekorde altiris 200 partoprenantojn. La temon "Labori internacie" traktis i.a. Roberto Tresoldi, e-ista spertulo pri publikaj rilatoj, kaj Claude Gaccond. La famiganta trupo Fia Koincido ludis la komedion *Kuracisto de frenezuloj* de Edoardo Scarpetta, en traduko de Alessandro Amerio kaj Mary Priemerano. (*L'Esperanto*)



Akademio: Novaj membroj

Meze de junio la Akademio de Esperanto anoncis la rezulton de la ĵus okazintaj elektoj por la membreco en la Akademio. Krom la reelektiĝo de pluraj malnovaj membroj, novaj akademianoj fariĝis: Julius Balbin (Usono), Hitosi GOTOO kaj Gaku KONISI (Japanio), Georges Lagrange (Francio), Carmel Malia (Malto), Sergej Pokrovskij (Ruslando) kaj Gonçalo Neves (Portugaliao).

Informado: Ne propagandon

Laŭ interkonsento, sekciestro de la rusia inform-agentejo ITAR-TASS regule enmetos en sian informbazon novaĵojn pri Esperanto. La kondiĉo: estu informoj, ne propagando. (*Ruslanda Esperantisto*)

Dank' al Arman Neshvad, *The Seattle Times*, la plej granda ĵurnalo de la usona ŝtato Vaŝingtonio, aperigis la 11-an de aprilo pozitivan artikolon pri



Kamboĝo: Chhim Sokha raportas: "Nova jaro, nova klaso en Kamboĝo". Jen motorcikla hejmeniro post E-kurso en la sidejo de Kamboĝa Esperanto-Asocio.

Norvegio: NEL ne paktis

Norvega Esperantista Ligo (NEL) petas sciigi ke la "pakto" inter NEL kaj la norvega Unio por Interlingua, aludita en aprilo (p. 77), estas nur neformala interkompreno. La celo de la notico aperinta pri tio en *Norvega Esperantisto* estis nur admoni la NEL-membrojn ne ataki publike la Interlingua-Union sur la paĝoj de la norvegaj gazetoj.

Pollando: Politika Semajno

La Kvina Esperanta kaj Politika Semajno (Komańcza, 2-9 okt.) debatos i.a. la kvinjaran germanan unuecon, la 50-jariĝon de UN, la polajn prezidentajn elektojn; eblos ankaŭ intense lerni E-on kaj ekskursi en montara regiono. Organizas: Eŭropa Federacio (Wojciech Soczówka, Rathausstr. 92, Mariendorf, DE-12105 Berlin, Germanio; tel./faks. +49/30/706-17-23).

Kohl ne volas "Esperanto-Eŭropon"

Dum sia vizito en Nederlando, la germana kanceliero Helmut Kohl de-

E-o sur du paĝoj, kun la adreso de la usona asocio ELNA.

Instruado: Al rifuĝintoj

Porinstruista seminario pri "Instruado al rifuĝintoj" kaj "Aŭdividaj kursoj" atendas ILEI-membrojn en Heerlen (Nederlando) inter la 15-a kaj 17-a de marto 1996. (Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri E-o, Middenweg 587, 1704 BH Heerhugowaard)

La 4-an de feb. fondiĝis Esperanta sekcio de Nacia Asocio de Fremdlingvo-instruistoj en Italio. Ĝin prezidas Marina Catricalà (Universitato de Sieno); sekretarias Renato Corsetti. La sekcio aranĝis seminarion (28 apr., Romo) pri "La trejnado de instruistoj de Esperanto kaj de lingva orientado en la itala-eŭropa lernejo". (*L'Esperanto*)

La Roma katedro de Itala E-Instituto organizis en Bolsena metodikan seminarion (29 apr. - 1 majo), kie prelegis i.a. Corsetti, Elisabetta Formaggio kaj Pier Luigi Cinquantini. (M. Lipari)

La japanaj kursoj raportitaj en majo (p. 99) ne realiĝis pro manko de partoprenantoj, krom kurso por kvin progresantoj ĉe la eldonejo Daigaku Syorin. (*Revuo Orienta*)

Ĵurianoj G. Kurucz, S. MacGill, O.

Princz, F-G. Rössler, Ivan Špoljarec kaj Erika Tóth tre kontentis pri la nivelo de la 6-a Tutlanda Deklam konkurso (Tata, Hungario, 7-9 apr.), en kiu kunvenis ĉ. 60 konkursantoj kaj gastoj, i.a. naŭ kroatoj. (G. Kurucz)

Komerco: Alp-adria sprono

40 partoprenantoj el 6 landoj — inter ili kvar profesiaj komercistoj — kunvenis en Szombathely (Hungario) por preparoli internacian komercadon kadre de la 7-a Alp-Adria E-Konferenco (21-23 aprilo). Ĉeestis kaj "foriris kontenta" la ĝenerala sekretario de la loka Komerca Ĉambro. István Gulyás prelegis pri planata nova fervoj-ligo inter Slovenio kaj Hungario. (*La Eta Gazeto*)

Kulturo: Kunkreu kvinan KEF

Kvinan fojon okazos Kultura E-Festivalo inter la 6-a kaj 11-a de aŭgusto 1996, en Kopenhago, kiam tiu estos eŭropa kultura ĉefurbo. La aranĝantoj jam nun serĉas kontaktojn kun muzikistoj, pentristoj, komponistoj, verkistoj, komediantoj, skulptistoj kaj aliaj artistoj, kiuj kunkreas kaj prezentos Esperantajn verkojn. Ili precipe ripensu ke en 1996 centjariĝos la Esperanta teatro. Kontakto la KEF-

E-RO

klaris en Roterdamo: “Ni volas ne Esperanto-Eŭropon, sed Eŭropon en kiu ĉiu gardas sian identecon.” Pluraj radiostacioj dissendis tiun informon, kaj preskaŭ ĉiu dua germana ĵurnalo aperigis ĝin. Germana E-Asocio tuj disfakis deklaron proteste kontraŭ tiu misfamigo de Esperanto kaj emfazis ke la E-movado celas protekti la naciajn lingvojn kaj kulturojn anstataŭ forigi ilin. Pluraj gravaj ĵurnaloj, i.a. *Frankfurter Allgemeine Zeitung*, aperigis tiun deklaron. Krome multaj germanaj kaj eĉ eksterlandaj e-istoj reagis per letero de leganto aŭ persona letero al Kohl. (U. Matthias)

Sekretariejon: p/a Jacob Nordfalk, Radmandsgade 53, 2. th., DK-2200 København; tel. +45/31-83-82-20; retpoŝto nordfalk@fys.ku.dk.

Muziko: Kajto en Italio

Itala E-Junularo kaj lokaj E-grupoj organizis turneon de Kajto en Torino, Treviso, Padova, Udine kaj Trento (29 apr. - 5 majo), por centoj da spektantoj. Ĉiu grupo sukcesis akiri subvenciojn, kiuj plene repagis la elspezojn. Realigis pluraj intervjuoj kaj artikoloj. (*L'Esperanto*)

Sano: Puraj pulmoj

En sia bulteno *Puraj Pulmoj*, Jiří Rada (Rybalkova 1029, bl.645-A CZ-434 01 Most, Ĉeĥio) kaj Bart Ruigrok (Lissabonweg 61, NL-3137 LB Vlaardingen, Nederlando) anoncas la fondiĝon de Tutmonda Agado de E-istoj Nefumantaj, kaj atendas seriozajn ideojn.

Scienco: Selten-semajnfino

Ĉefpunkte de la 45-a Kultura Semajnfino de Sarlanda E-Ligo (Homburg, 28-30 apr.), la Nobel-premiito Reinhard Selten enkondukis per sesora seminario la partoprenantojn al ludo-teorio. Ili povis mem roli entreprenistojn en situacioj de decido kaj poste teorigii la rezultojn. Selten, “humana pedagogo kaj firma instruisto . . . , scipovis tre rigore kaj aŭtoritate respondi al ŝvebaj demandoj de temo-foraj studentoj”. (*Dialogo*)

Per-sone



Röllinger: 90-jara

La 1-an de aŭgusto festos sian 90-an datrevenon Hugo Röllinger, la dojeno de la Delegita Reto de UEA. Fakte li povus okazigi tutan serion da festoj: ĉi-jare kompletigos 65 jaroj de lia delegiteco en UEA; venontjare li estos 75 jarojn esperantisto, kaj pasos 70 jaroj de post la unua el liaj sennombraj Esperanto-kursoj. Jam ekde 1923 li estas membro de UEA, same kiel de Germana Esperanto-Asocio kaj SAT. Konvinkita kaj kuraĝa kontraŭnaziisto li estis maldungita kiel ŝtatoficisto, kaj

nur post la milito li povis komenci laborkarieron, kiun li finis kiel sekciestro de ŝtata sociala asekuro. Pluraj eroj el la vivo de Röllinger estas kvazaŭ ĉapitroj el aventurromano: riskante sian vivon, kiel soldato de la germana armeo li kaŝportis en sia uniformo Jarlibrajn pagojn de la “malamikaj” landoj kaj sukcesis kontakti esperantistojn en Francio kaj Nederlando.

Röllinger restas nekutima ankaŭ ankaŭ okaze de sia jubileo: estas li, kiu donacas. Pli-malpli samtempe kun lia festo eniris presejon lia vivoverko: dokumentaro pri 985 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 52 landoj. Tiu verko kronas lian 35-jaran laboron kiel komisiito de UEA pri la tiel nomataj ZEO-j, laboro kvazaŭ antaŭdestinita ĝuste al homo kun liaj persisto, insistero kaj detektiva sagaco.

OFICIALA INFORMILO

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Brazilo: Henrique Solon Brandão Knoedt.

SOCIETO ZAMENHOF 1995

Ĉinio: Wang Yuqin. Finnlando: Harri Tuomola. Hispanio: L.E. Hernández García; Pere Julià; R. Urueña de Hernández. Svedio: Inga-Maj Lindkvist; Inga Nothfalk. Svislando: Furio Gabrielli. Usono: Doris Vallon-Wheeler; Thomas A. Goldman; Ralph A. Lewin; Teuntje E. Goldman.

Sume por 1995 ĝis nun 262 anoj de Societo Zamenhof.

DONACOJ 1995 (gld.)

ĝis la 30-a de junio

Fondaĵo Afriko: Britio: P.G. Hayward 500,00. Francio: UFE (por vojaĝo Ngangu) 315,70. Nederlando: C. Bos-song 28,41. Svedio: A. Dagmarsdottir 200,00; E-Klubo Norrköping 100,69. Sumo ĉi-jara 4494,07.

Fondaĵo Ameriko: Finnlando: A. Mak-konen 10,80; E.O. Väisänen 18,00. Sumo ĉi-jara 712,53.

Bialistoka E-Centro: Nederlando: F. Zeiler 75,00. Sumo ĉi-jara 75,00.

Biblioteka Fondaĵo: Nederlando: F. Zeiler 75,00. Sumo ĉi-jara 187,00.

Fondaĵo Canuto: Britio: V. Hartley 24,90. Ĉinio: B. Sun 37,36. Finnlando: S. Mynttinen 180,00. Francio: R.

Llech-Walter 37,36. Germanio: M. Vitalyos 76,00. Japanio (por aziaj e-istoj): J. Brozovsky 37,36; H. Egawa 37,36; K. Hirose 37,36; N. Isogae 37,36; E. Kimura 37,36; W. Lin 37,36; H. Matuda 74,72; H. Miedema 37,36; H. Mitu 37,36; S. Murakami 37,36; M. Tahira 74,72; H. Yosida 37,36; S. Yosikawa 37,36. Nederlando: A.P.G. Ploeg 20,00; F. Zeiler 97,00. Svedio: E-Klubo Norrköping 100,69. Subvencio Institucio Hodler 2000,00. Sumo ĉi-jara 7510,46.

Ĝenerala Kaso: Britio: C.A. Field 24,90. Finnlando: V. Penttillä (por SZ) 18,30. Sumo ĉi-jara 2804,60.

Konto Espero: Aŭstrio: G. Kranl 11,13. Usono: G. Harabagiu 235,70; Junulara E-Semajnfino 32,33. Sumo ĉi-jara 1343,76.

Pensia Fondaĵo: Slovenio: J. Židanik 708,20. Sumo ĉi-jara 708,20.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Hispanio: Ana Salvador Galvan 125,00. Nederlando: A.P.G. Ploeg 10,00. Norvegio: T. Kvakland 107,00. Sumo ĉi-jara 993,51.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: A.P.G. Ploeg 10,00. Subvencio Institucio Hodler 1000,00. Sumo ĉi-jara 1159,00.

Fondaĵo Wüster: Nov-Zelando: S.F.N. Hill 69,88. Sumo ĉi-jara 69,88.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Jean Thierry (1924-1995)

La 17-an de junio forpasis en Parizo akademiano Jean Thierry.

Thierry naskiĝis la 27-an de aŭgusto 1924. Esperanton li renkontis en la komenco de la 50-aj jaroj. Li fariĝis konvinkita e-isto en la "vigla, gaja kaj sprita etoso" de la kabareto La Tri Koboldoj de Raymond Schwartz, kie de post 1953 li mem sursceniĝis kun anekdotoj kaj memtradukitaj kanzonoj. Li teatris ankaŭ en amatora E-trupo kaj rolis epizode en la E-lingva filmo *Angoroj* (1963). Grandnombre li verkis teatraĵetojn kaj skeĉojn, el kiuj multaj estis prezentitaj en E-aranĝoj. Amiko de Schwartz, Thierry ankoraŭ pasintjare prelegis pri li en kolokvo de la Akademio de Esperanto.

Thierry rapide ricevis sinsekvajn movadajn respondecojn: Pariza vicdelegito de UEA (1956-61); konsiliano de Unuiĝo Franca por Esperanto (1957-74) kaj poste UFE-vicprezidanto, respondeca pri kulturo kaj pri eksterlerneja E-instruado (1967-74); redaktoro de *Franca Esperantisto* (1963-66), kaj prezidanto de Franca E-Instituto. Li estis inter la fruaj

subtenantoj de Kastelo Grésillon: li ofte gvidis seminariojn tie kaj en aliaj kulturcentroj Esperantaj, kiel La Kvinpetalo en Bouresse.

Li funkciis kiel komitatano de UEA inter 1958 kaj 1974, kaj estis estrarano pri kongresoj kaj konferencoj (1969-1971). Dum jardeko li reprezentis UEA ĉe la Pariza sidejo de Unesko. Proteste kontraŭ la ŝanĝoj en UEA de post la Hamburga UK, en 1974 li ekŝiĝis el la Asocio.


Li kunfondis *Horizonto*, la revuon de Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM), kaj membris en ties redakta komitato dum la tuta aperdaŭro (1976-1987). La duan Internacian E-Konferencon de NEM li kunorganizis en Parizo (1976). Li vicprezidis Organizan Societon de Internaciaj E-Konferencoj ekde ties fondo (1988).

En sia lasta jardeko li elstare aktivis sine de la Akademio de Esperanto. Ekde sia membriĝo (1986) li okupis la postenon de sekretario-kasisto. Samjare li kunfondis la subtenan asocion "La amikoj de l'Akademio de Esperanto". Helpate de sia edzino, de 1987



li redaktis la jarkvaronan bultenon *La letero de l'Akademio de Esperanto*.

Thierry aŭtoris la lernolibrojn *Je parle espéranto* (1972, 50 mil ekz.) kaj, precipe, *L'espéranto sans peine* ("Esperanto sen peno", 1973, 1993), kiu aperis en la fama franca serio Assimil. Li estis kunlaboranto de *Esperanto en perspektivo*, kaj regule kontribuis al *La Gazeto* kaj aliaj E-periodaĵoj.



CHEN Shide (ZENSTO) (1905-1995) forpasis la 2-an de marto en Pekino. Li eklernis Esperanton en 1928. En 1931, kun Hujucz kaj aliaj, li fondis Ĉinan Proletan E-istan Union. La mimeografita *Proletara E-koresponda mesaĝo* estis tradukita kaj presita en lia hejmo. En 1933 li fondis la revuon *Tagiĝo*. Li organizis E-societojn en Suzhou (1933), Changsha (1938) kaj Chongqing (1950); la lastan li ankaŭ prezidis. En 1952 li eklaboris kiel sekretario de Ĉina E-Ligo, poste ankaŭ

en la redakcio de *El Popola Ĉinio*. Li gvidis E-kursojn en superaj lernejoj, ĉe radio (1964), kaj multaj el liaj lernintoj fariĝis profesiaj e-istoj. En la 80-aj jaroj li revigligis la movadon en Suzhou, kunfondis kaj prezidis asocion (1983) en Jiangsu. Zensto estis vicprezidanto de Pekina Asocio de Veteranaj E-istoj, komitatano — poste honora komitatano — de ĈEL, ĉefredaktoro de *Nova vortaro Esperanta-Ĉina* (1959), fakdelegito pri tradukado kaj E-instruado.

Karl NELL (1905-1994) forpasis en Rochester (NY, Usono) la 26-an de decembro 1994. E-isto ekde 1924, li aktivis en sia hejmurbo Vieno. Internigita en Dachau kaj Buchenwald en 1938 kiel judo kaj politika aktivulo, li liberiĝis kelkajn semajnojn antaŭ la eksplodo de la dua mondmilito dank' al garanti-letero de brita esperantisto, prof. Russell Scott. Post novhejmiĝo en Rochester, li fariĝis kemiisto kaj aktivis en homrajtaj kaj pac-movadoj. Delegito dum 28 jaroj pri vegetara-

nismo kaj kemio, li esperantigis fakajn tekstojn, instruis E-on preskaŭ seninterrompe kaj verkis pri ĝi artikolojn en multaj nacilingvaj revuoj.

Jack-André ROUSSEAU (1913-1995) forpasis la 9-an de majo en Parizo. Lerninte Esperanton por la Pariza UK (1932), li funkciis kiel kasisto de la Pariza Federacio kaj, de 1958 ĝis 1994, de Unuiĝo Franca por Esperanto. Li instruis E-on dum 20 jaroj, prizorgis karavanojn de UFE al Universalaj Kongresoj (1959-1975), kaj en 1972 redaktis dum kelkaj monatoj la UFE-organon *Franca Esperantisto*. Eĉ siajn hobiajn li kunligis kun Esperanto: kiel aktoro, li ludis dum la UK en Majenco (1958) kaj en la filmo *Angoroj* (1963); kiel filatelisto, li artikolis dum jardekoj en fakrevuoj pri E-filatelo franclingve kaj pri francaj filatelaĵoj Esperante. Dek jarojn li reprezentis UFE en la Komitato de UEA. Li estis honora prezidanto de UFE, dumviva membro de UEA kaj delonga ano de Societo Zamenhof.

En Zairio Emilo Malanda Nianga (Home Alphon-
sianum, B.P. 839, Kinshasa XI) fondis studentan
E-klubon. Sendu al li subtene E-materialojn.

Korespondus pri ĥora kanto D. Caux, FR-79450
Fontenieux, Saint Aubin, Francio.

Nova adreso de Helianto, informilo de Ukrainia E-
Asocio: Niko Vološin, UA-263018 Luck-18, p.k. 26,
Ukrainio.

**La adreso de Georgo Ka-
maĉo** sur p. 70 de Jarlibro
1995 ("Akademioj") validas
nur ĝis la fino de julio. Ko-
respondaĵojn oni plu adresu
al: Jorge Camacho, Chan-
tada 43, ES-28035 Madrid,
Hispanujo.

**Bv. noti novan telefon-
numeron** de la oficejo de KAVA-PECH, kiu estas
+42.2.991.2201. La ĝisnuna numero 991.2126 plu
validos nur kiel faksonumero.

Multaj e-istoj petas ke mi sendu al ili jarkolektojn de la
revuo *Horizonto*. Bedaŭrinde, ĝi elĉerpiĝis jam antaŭ
longe. Se posedantoj donacus al mi ekzemplerojn aŭ eĉ
jarkolektojn, mi pli ol volonte akceptus ilin kaj plu-
sendus al la petantoj. Anticipan dankon. Birthe Lapenna,
Grøndalsvej 30, DK-2000 Frederiksberg, Kopenhago,
Danio.

Korespondi deziras tutmonde:



F-ino, komputila magistro-studentino: Li
Xiuqi, Y944, 58 Xinxiang, Youdian Daxue,
CN-100088 Beijing, Ĉinio; hobiaj: kanti,
muziko, angla, japana lingvoj; masaĝi,
kureti, kuirarti, filateli, danci, foti, vojaĝi,
volani, tablotenisi, plekti.

F-ino, komputila asistanta inĝenierino: Jiang
Xiafang, Youdian Xincun 22-502,

Shentangqiao,
CN-310012

Hangzhou,
Ĉinio; angla,
germana lingvoj; muziko,
danci, foti, filateli, vojaĝi,
sporti, kuirarti.

**F-ino, kompu-
tilistino banka:**

Wang Ai, Beitai-

pingzhuanglu 33, CN-100088 Beijing,
Ĉinio; angla lingvo, muziko, filateli, alumeta
bildo, moneroj, tablotenisi, foti, vojaĝi,
kuirarti.



Pro urbestra decido sveda gimnazio povos enkonduki
Esperanton kiel elekteblan studfakon. Kuraĝigu la
rektoron sendante leteron aŭ bildkarton kaj esprimante
pretecon kunlabori. Lia adreso: Rektor, Duveholms-
gymnasiet, Västgötagatan 31, S-641 36 Katrineholm,
Svedio.

Ankaŭ vi povas kontribui! Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda
Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la
kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!



12-A INTERNACIA FESTIVALO

la jarfina aranĝo por familioj
kaj personoj 25-55 jaraĝaj
27 dec. 1995 - 3 jan. 1996
Inf.: H. D. Platz, Fakso +49-5624-322
Adr.: Pf. 1148, DE-34303 NIEDENSTEIN



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto
tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994
(2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Ĉapelilo 1.0

Komerce pretigita tekstoprilaborilo por Esperanto sur IBM-kongruaj komputiloj ekde
Vindozo 3.0. Helpsisistemo kaj manipulado pure en Esperanto. Ankaŭ por novuloj
facilege majstrebla. Esperantaj kaj nacilingvaj signoj sur ekrano kaj printilo. Skaleblaj
tiparoj por ĉiuj aplikoj. Ĉiuj necesaj funkcioj por alloge aranĝi vian tekston. Literumad-
kontrolilo baze de redakteblaj vortaroj kun pli ol 120 000 vortoj. Disadresada funkcio.
Importo kaj eksporto per diversaj formatoj por interŝanĝo. Grafikaĵoj integreblaj.

Enkonduka prezo nur 200 germ. markoj plus ekspedo. – Tuj mendu! Esperanto parolata!

Tel: +49-6081-66722, fakso: +49-6081-3955, reto: 100103.24@compuserve.com
Professional Consulting, s-ro PEJNO Simono, Am Füllgarten 4, D-61250 Usingen

Patrino koro

*Simplaj, romantikaj
rakontoj pri la
esperantista vivo*

Nevena Nedelčeva. Rotterdam / La
Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./
preso). 148p. 17 cm. Prezo: 12,00 gld.
Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.


La 27-a Korea Kongreso de Esperanto

okazos en la 28-a kaj 29-a de oktobro 1995 en la urbo Iksan. Ĝi kun la antaŭkongreso havos interesajn programojn speciale por eksterlandanoj kaj ofertas bonegan ŝancon ĝui la plej altan kaj bluan ĉielon de la korea aŭtuno. Partoprenkotizo por eksterlandanoj: 40 USD.

Detalajn informojn petu ĉe Korea Esperanto-Asocio: CPO Kesto 4258, Seulo, Koreio 100-642.

Tel.: 82-2-614-5784, fakso: 82-2-614-5785

Reto: keast@soback.kornet.nm.kr



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.

Europa Federacio invitas al

Kvina Esperanta kaj Politika Semajno

Komańca (Pollando), 2-9 oktobro 1995.

Vd. ankaŭ sur p. 138.

Verkoj kiuj koncize kaj klare enkondukas al Islamo

Elektitaj versoj el la Sankta Korano. El la araba tradukis Italo Chiussi. 1988. 124p. 21cm. Versoj zorgo, laŭteme elektitaj el la Sankta Libro de la islamanoj. 12,00 gld.

Elektitaj eldiroj de la Sankta Profeto Mohammad. El la angla trad. A.J. Middelkoop. 1991. 53p. 21cm. Dulingva: araba-E. Kolektitaj eldiroj de la sankta fondinto de Islamo, grupigitaj laŭ temoj. 5,40 gld.

Elektitaj partoj el la verkoj de la Promesita Mesio. Hazrat Mirza Ghulam Ahmad. El la angla trad. A.J. Middelkoop. 1991. 78p. 21cm. Dulingva: araba-E. Ĉerpo el la ĉ. 80 libroj verkitaj de la Atendata kaj Promesita Mesio kaj Mahdi, la fondinto de Ahmadiyya-Islama Komunumo. 6,60 gld.

Mendebaj ĉe la Libroservo de UEA. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Eldonis: Ahmadiyya-Islama Komunumo, Hago (Oostduinlaan 79, 2596 JJ Den Haag, Nederlando).

jubileo

jarcento de esperanto

Impona memorlibro kun raportoj pri la festado de la centa jaro de Esperanto tra la mondo kaj kun artikoloj, kiuj resumas la unuan jarcenton. Ĉio en ĵurnalisme vigla aranĝo kaj ilustrita per preskaŭ 200 fotoj.

Red. Mark Fettes, Rotterdam: UEA, 1988. 24cm. 162p. Prezo: 39,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Jen la plej


vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KITAKTO

estas gazeto por ĉiu, kiu serĉas interesan legadon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KITAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1995 **KITAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.

ABONTARIFO 1995

Aŭstralio	30 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	30000 liroj	Svedio	170 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj



Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

2-A ELDONO

MARJORIE BOULTON



"Unika legolibro, plej bonveniginda kaj rekomendinda al ĉiuj studentoj de la Internacia Lingvo."

Baldur Ragnarsson

Fabeloj, mirindaĵoj kaj internaciaj rakontoj sur pli ol 400 paĝoj . . .

Rotterdam: UEA, 1993 (dua korektita eld.). 431p. 21cm. Prezo: 36,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.